



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Marto 2017 n-ro: 15



Merhaba!

Istanbul'un Anadolu yakasında, Marmara denizinin Boğaziçi ile birleştiği noktada, Kadıköy'den merhaba!

Resimde şehir hatları vapuru ve Osmanlı imparatorluğunun son dönemlerinde ahşap kazıklar ile denizin doldurulup Almanlar tarafından inşa edilen Haydarpaşa Tren Garı var.

Mart sayımızla gene birlikteyiz. Bu sayıda biraz uzun da olsa esperantist arkadaşımız Konuralp Sunal'ın yazıp tek başına 6 rolü oynadığı çok ilginç tiyatro metnini Esperanto diline çevirip yayınlıyoruz.

Bunu dışında birbirinden ilginç yazılar, hikayeler, şiirler, fıkralar, bilmeceler de abone sayısı 200'e varan dergimizi zenginleştiriyor.

Herkese iyi okumalar !

Saluton!


Saluton el Kadıköy, la urbeto en la Anatolia (orienta) parto de Istanbulo ĵus tie, kie Bosforo kunigas Marmara maron.

En la bildo estas urba pramo, kaj videblas la granda Haydarpaşa stacidomo konstruita sur trajoj enŝovitaj en la maro dum la lastaj jaroj de Osmana imperio far de germanoj .

Ni denove estas kune kun vi en nia marta numero. En ĉi tiu numero vi legos la iomete longan tradukaĵon de la teatraĵo verkita de nia esperantista amiko Konuralp Sunal, kaj kiu ludis ĉiujn ses rolojn nur li kaj sole.

Krom tio, estas multaj aliaj verkaĵoj en ĝi: rakontoj, artikoloj, poemoj, ŝercoj, kurĉvort-enigmo ktp kiuj pliriĉigas nian revueton, kies abonantoj nun estas 200.

Bonan legadon al ĉiuj!



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo


Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
ANONCO pri Turka Stelo	2
ALVOKO pri nova angulo	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de geamikoj	4
Laboru kun UEA	4
Tra la Mondo	4
Enigma de la Nebula Nokto (teatraĵo)	5
Koloroj el diversaj popoloj	10
Kio ni estas kaj kion ni celas (2)	11
Iniciato por progresigi retajn kursfinintojn	13
Ĉu neandertalaj homoj kapablis paroli?	13
Reenkarniĝo (rakonto facila)	14
Reala travivaĵo aŭ sonĝo? (rakonto meznivela)	15
Dankon Amiko (2)	16
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (2)	17
El la libro de "Dao de Jing" (8)	17
Mallonga Historio de Filozofio (14)	18
Kriol: la kreolo parolata en Gvineo Bisaŭo	19
Alvoko al amo (poemo)	20
Tago de Sankta Valentino	20
"Utaro de Takuboku" Japana poemstilo	20
Veganarto	21
Ŝercoj	22
Kruĉvortenigmo	22
Unu glas da lakto	23
La 6-a Afrika Kongreso	24
Hajkoj de Hirotaka Masaaki (Vastalto)	24
Efiko de amikeco	25
Esperanto estu la komuna lingvo de Olimpikoj	25
Esperanto Kurso (15)	26
Fermo	28



La 100^a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO


Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo

Kursoj



- 1) La kurso en la Lernejo Ŭsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulo daŭras.
- 2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.
- 3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

ANONCO pri Turka Stelo



La lasta numero de Turka Stelo nun estas legebla rekte en la reto. Sufiĉas ke vi iru al la jena retpaĝo en la komenco de ĉiu nova monato:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuetu/>

ALVOKO pri nova angulo



Karaj geamikoj, Ni volas krei angulon en Turka Stelo nomita "Koloroj el diversaj popoloj" en kiu ni publikigos tekstojn pri arto, kulturo, festo ktp el diversaj landoj kaj nacioj. Se vi volas verki malgrandan tekston (almenaŭ

duono de A4 papero) kaj aldoni almenaŭ unu foton kaj se eblas unu ligilon al Jutubo ni ŝatus publikigi ĝin en nia revueto.

La unuan angulon ni jam aperigis en ĉi tiu numero. Ĝi estas pri la Barata festo por diino Sarasvati. (Rigardu la 10-an paĝon)

Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



Kiel vi scias la 44-a Internacia Esperanto Sumoo, kiu okazis dum januaro finiĝis sukcese kun rekorda numero de

landoj kaj legantoj. Vi povas legi pri tio en la februara numero de nia revueto.


Recenzoj de libroj legitaj dum la januara Sumoo jam aperis en nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/recenzojan2017.html>

Legu ilin por decidi pri kiun libron vi legos en la marta Esperanto Sumoo kiu okazos inter la 12-a kaj 26-a de marto.

La celo de Sumoo estas altigi la legkapablon de esperantistoj kaj kutimigi ilin legi librojn kun ĝojo. Por tio vi devas elekti libron, kaj decidi kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo. Trifoje dum la Sumoo vi raportos vian tagajn venkojn per "o" aŭ malvenkojn per "x" al via prizorganto. **Atentu ke vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem!**

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/regularo.html>



UEA



Alvoko por labori por Gazetara Kampanjo "Zamenhofjaro"

UEA serĉas administrajn helpantojn!

La Estraro de UEA decidis pri speciala gazetara kampanjo okaze de la "Zamenhofjaro". La celo estas informi plejble multajn gazetojn, radiostaciojn, televidstaciojn, retpaĝojn aŭ blogojn pri Zamenhof kaj Esperanto.

Por tiu tasko UEA serĉas administrajn helpantojn, kiuj kune organizu la koncernan kampanjon. Unu el la plej gravaj taskoj estas la kolektado de kontaktinformoj de amaskomunikiloj el ĉiuj partoj de la mondo kaj posta kontaktado kaj informado al kaj pri la koncernaj amaskomunikiloj.

La koncernaj homoj havu komputilon kaj lerton uzi ĝin, la kapablon rapide serĉi kaj esplori la interreton kaj laŭeble rapidan tajp-kapablon (ja temas pri registrado de datumoj).

UEA serĉas kaj volontulojn kaj homojn, kiuj pretus labori kontraŭ eta honorario. Se vi interesiĝas pri kandidatiĝo, bv. sendi informojn pri vi (eta vivresumo, kapabloj, konoj, lingvokonoj, movada historio) al zamenhofjaro100@gmail.com ĝis la 14-a de februaro 2017. Bv. mencii kiom da tempo vi planas elspezi pri la tasko kaj kiajn rimedojn kaj eventualajn rekompencojn vi bezonus kaj kiom ili kostus.

Emilio Cid

TEJO



Malferma alvoko: TEJO serĉas kreanton de telefona aplikaĵo

TEJO nuntempe organizas trejnadprogramojn kadre de la AEJK-projekto (Afrika-eŭropa junulara kapabligo) pri kunlaboro inter afrikanoj kaj eŭropanoj. La temo estas trejnado : kiel organizi lern'atelierojn, kiel interesigi la partoprenantojn, kiel proponi taŭgan materialon...

TEJO planas realigi telefonan aplikaĵon pri tiu trejnmateriale tiel ke ĝi povos esti daŭre utila kaj videbla. Se vi ŝatas krei apon, venu partopreni en bunta projekto!

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/malferma- Alvoko-tejo-sercas-kreanton-de-telefona-aplikajo-2/>

TEJO partoprenas en ECOSOC – Junulara Forumo 2017 ĉe la Unuiĝintaj Nacioj!

LA VALORO DE JUNULARA LABORO

Francesco Maurelli, Sara Spanò kaj Raúl J García reprezentis TEJO-n en ECOSOC – Junulara Forumo 2017 ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko!

Francesco Maurelli parolis pri financado por junularaj organizoj. Rigardu en la jena video je 1:13:30

<http://webtv.un.org/meetings-events/watch/interactive-discussion-ecosoc-youth-forum-2017/5305767995001>

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/tejo-partoprenas-en-ecosoc-junulara-forumo-2017-ce-la-unuigintaj-nacioj/>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton!

Mi estas Osman. Mi estas via leganto. Mi amas vian revuon. Ĝi estas tre bela. Mia Esperanto ne estas bona. Mi komprenas sed ne parolas. Sed mi volas lerni. Mi amas viajn laborojn pri Esperanto.

Bonan laboron!

Osman Inan

Laboru kun UEA

Emilio Cid



La Estraro de UEA klopodante igi la asocion pli demokratia, lanĉas la Forumon de UEA -

<http://forumo.esperanto.net/>. Ĝi

estas la oficiala kunlaborejo de UEA, kie ĉiu esperantisto havos oportunon labori proksime de la Estraro, kaj la Estraro havos oportunon koni novajn agadproponojn.

Por la estraranoj, komisiitoj kaj oficistoj de UEA estas tre malfacile akompani la diskutojn tra pluraj grupoj en la reto, kaj de tio rezultas manko de niaj respondoj kaj agoj.

La forumo ne celas anstataŭi diskutojn de la aliaj grupoj, fakte ni preferas, ke ili daŭre ekzistu, kaj ke la membroj diskutu pri diversaj temoj tie, sed ni provas krei manieron por ke post la maturiĝo de tiuj diskutoj oni afiŝu la konkludon, eĉ kun pluraj vidpunktoj, per resuma maniero en la koncerna rubriko de nia forumo. Tiel ni centros en unu sola loko gravajn informojn, kiuj estos ĉiam facile retroveblaj en ĝiaj kategorioj, rubrikoj kaj sub-rubrikoj.

En la forumo estos pluraj kategorioj, rubrikoj kaj

subrubrikoj, do eblas facile organizi laŭteme, kaj ĝi funkcios ankaŭ kiel konserva loko, do ni certigos, ke neniu ideo perdiĝos kaj ke ĝi estos facile retrovebla. Cetere ni intencas plusendi la afiŝojn de la nova forumo al la koncerna respondeculo pri la temo diskutata, kio certe rezultigos praktikajn atingojn, aŭ almenaŭ kontentiganj respondojn.

Ni invitas vin viziti la supre menciitan adreson por konatiĝi kun la kunlaborejo. Jam estas kelkaj pretaj rubrikoj, kiuj atendas vian kunlaboron.

Ni sugestas ke vi komencu vian esploron per la kategorio [Legu ĉi tiun instruon unue]

<http://forumo.esperanto.net/index.php?board=33.0>

, kie vi ekscios kiel registriĝi kaj uzi la forumon.

Pluraj aliaj kategorioj kaj rubrikoj alvenos, laŭ nia bezono kaj laŭ via disponeblo kunlabori. Ni atendas vian partoprenon!

Fonto:

<https://www.facebook.com/groups/Universala.Esp. eranto.Asocio/permalink/768637049968947/>

Tra la Mondo

Ĉina Donaco en la Printempa Festo

28/01/2017

Karaj,

Hodiaŭ estas la unua tago de la Ĉina Novjaro 2017. La Printempa Festo okazas tradicie 15 tagojn ekde hodiaŭ.

En la gaja Printempa Festo mi sendas al vi ĉinan donacon: la unuan numeron de la nova revuo "Tra la mondo" senpage elŝultebla ĉe

[http://www.elperno.cn/elibro/Tra-la-mondo\(reta\).pdf](http://www.elperno.cn/elibro/Tra-la-mondo(reta).pdf)

Vi rajtas dissendi la revuon en viaj landoj laŭ via plaĉo. Viaj artikoloj al la revuo estas bonvenaj.

Mi kore deziras al vi ĉiuj Feliĉan Novjaron!

Amike,
Trezoro Huang
Yinbao

ĉefredaktoro de
Tra la Mondo



Fonto:

<https://www.facebook.com/algispijus/posts/10209577546893895>



Mi verkis tiun unuaktan teatraĵon bazite sur la scenaro de la japana filmo *Raŝomon* (filmita en 1950). *Raŝomon* signifas "alta pordo de urbo".

La scenaro de la filmo estas la sentezo de du mallongaj rakontoj "En la arbaro" kaj "Raŝomon" de japana verkisto Ryunosuke Akutagawa. Fakte la tuta teatraĵo estas bazita sur la rakonto "En la arbaro". Mi, kiu loĝas en Büyükada insulo, ŝanĝis la lokon de la sceno al iu fikcia insulo kaj la titolojn de la roluloj kei jene:

- La mortigita samurajo fariĝis la Admiralo
- La ĉarpentisto, fariĝis la Lumturo Gardisto
- La monaĥo fariĝis la Fiŝkaptisto Religiemulo
- La banditon mi nomis Ferpugnulo

La Neatenditan Gaston mi rolis mi mem.

La du homojn (Lumturo Gardisto kaj Fiŝkaptisto Religiemulo), kiujn la Neatendita Gasto renkontas en la lumturo, kaj kiuj rakontas la okazaĵon, rolis mi mem surmetante maskojn.

La Admiralo, La Virino, kaj la Ferpugnulo estis plastaj bustoj de firzisto sur kiujn mi algluis fotojn kaj kies vizaĝojn mi lumigis per torĉo kaj rolis ilin elparolante iliajn rakontojn.

Ĉiujn 6 rolojn ludis mi mem. La unua prezentado estis en la 11-a de januaro 2017 en Buyukada. La teatraĵo kreis grandan efikon. En la fono mi uzis sonojn de ondoj kaj sirenon de nebulo.

Mi ĉiam ŝatas vivigi kaj prezenti tion kion mi ŝatas kaj ĝuas.

Konuralp Sunal



Afiŝo de la teatraĵo

ENIGMO EN LA NEBULA NOKTO

AGANTAJ PERSONOJ:

- Neinvitita Gasto
- Lumturo Gardisto
- Fiŝkaptisto Religiemulo
- Ferpugnulo
- Virino (edzino de admiralo)
- Spirito de admiralo

SCENO: Inter la lumturo

NEINVITITA GASTO - Mi finfine trovis ĝin! Kia nebulo



Konuralp Sunal en la rolo de "La Neinvitita Gasto".

ĉi tiu estas! Ĝi blindigas la homon! Kaj la pado enkondukanta ĉi tien estis tro serpentuma! Mia stulta kapo! Kiel mi ne antaŭvidis la rokojn! Pro kio mi venis ĉi tien en la mezo de la nokto? Mi devis dormi en la boato, en la haveno! Kial mi malankriĝis kaj forboatiĝis? Ĉu estas iu ĉi tie? Ĉu estas iu ĉi

tie? Ho! kio ĝi estas?! Ĉiuj estas en vico. Kaj ĉiuj estas mortpafitaj en la frunto. Malbonodoras kadavro. Pfff! Ĉu masakro ankaŭ ĉi tie? Mi estis en la ĝusta vojo. Se ne estus ĉi tiu nebulo mi trovus mian direkton. Dum jaroj, eĉ ekde mia juneco mi neniam vidis tian nebulon. Eĉ la lumturo ne helpis. Ĉiuokaze, mi saviĝis per malmulta damaĝo. Mi riparos ĝin morgaŭ. Ĉu ne estas iu ĉi tie? Ili verŝajne ne aŭdis min. Certe devas esti gardistoj en la lumturo. Ĉu ne estas iu ĉi tie? Ho! jen la ŝtupoj... devas esti iu supren, ĝi ne povas esti fantoma lumturo, ĉu ne? Kia sono, ŝajnas al fosmaŝino! Iu ronkas... Ho! ... Jen li. La maljunulo profunde dormas. Jes, ĉi tiu fajrujo certe dormigas homojn profunde. Nebulsireno!... Mi aŭdis la nebulsirenon malfrue. Kaj tiu estas ŝajne por averto! Sed al kio ĝi helpis? Mi apenaŭ saviĝis de la rokoj, La kilo de mia boato estus kaptita, mi apenaŭ saviĝis de la rokoj. Kiam mi estis knabo mi multe ŝatis la nebulsirenojn. Ĉi tiu homo eble neniam vekiĝos... Mi malsatas...

LUMTURO GARDISTO – Heeee! Hej heeee! Kiu vi estas? Leviĝu la manojn? Kiel vi eniris ĉi tien? Ĉu ne



Masko de
"La Lumturo Gradisto".

estis gardistoj en la pordo? Mi parolas pri la mararmeaj soldatoj! Kio? Ĉu estis neniu? Ĉi tiun lokon gardas soldatoj. Oni ne povas eniri ĉi tien svingante siajn manojn! Kion vi volas je tiu horo? Ĉu vi estas insulano? Do vi venis el la ĉefa tero... tio estas de 150 milojn fore!... Jen! Rigardu min,

ĉu vi eble estas kontrabandisto? Ĉuuu? Ĉu oni forboatiĝas en tia nebulo? Ĉu vi ne aŭskultis la veterprognozon el la radioaparato? Bone, mi komprenas... Do, sidiĝu ĉi tie... Ne, ĉi tiu ne estas tiu insulo. Ĉi tiu estas la Trankvileco insulo. Vi parolas pri alian. Ĉu vi intencis iri tien? Mi komprenas vi estas frenezulo. En la mezo de la nokto forboatiĝi de tien ne estas faro de saĝa homo. Ĉu vi estis ebria? Elspiru kaj mi flaros! Hahahahaha... Hahahaaaa... Mi komprenis, mi komprenis, vi estas respektinda homo! Vi ne havas la aspekton de bastarda maristo. Ĉu vi volas manĝi ion? Do vi malsatas! Rigardu, bonan fiŝsupon kun cepojn kaj terpomojn mi havas. Nia fiŝkaptisto alvenos baldaŭ. Li kuiris ĝin. Li estas bona junulo. Mia helpanto, la gardisto malsaniĝis, li havas pneŭmonion, kaj li dum unu semajno kuŝas hejmen. Jen nia fiŝkaptisto, Dio ŝparu lin, li nokte venas ĉi tien por gardi la lokon kune kun mi. Li estas religiema junulo. Mi nomas lin Religiemulo. Kaj mi ne scias lian nomon! Mi eĉ forgesis la mian. Ĉiuokazeeeee... Jen manĝu. Ĉu vi ankaŭ volas panon? Jen, tiel. Mia filino faris ĝin per siaj manoj. Mia edzino mortis antaŭ multaj jaroj. Mi loĝas kun mia filino kaj miaj nepoj. Ankaŭ mia bofilo estas maristo. Li laboras en komercŝipoj kiel longvojo-kapitano. Mi dum 30 jarojn gardas ĉi tiun lumturon. Multaj deĵorantoj pasis de ĉi tiu loko sed mi restis. Mi najliĝis kiel tiu lumturo. Sed ĝi estas pli maljuna ol mi. Dum 150 jarojn ĝi estas ĉi tie! 150 jaroj! Ĵus kiel platanarbo. Kiu scias kion multon ĝi vidis ĝis nun, ĉu ne? Hahaha... Vinon, trinku vinon! Ĉu la kadavroj estis ankoraŭ en la enirejo? Ĉu ilin neniu forportis? Soldatoj.... Ĉi vespere ili mortpafis la politikajn forfuĝintojn de la malliberejo... Ekzekuto, do... Ili eble iris al patrolo. Ili baldaŭ venos por alporti ilin. Kaj la kadavrojn ili forĵetos el la klifo. La estraro de la insulo eĉ ne zorgas pri funebra ceremonio, nek entombigas la kadavrojn. Ili forĵetas la kadavrojn al la maro el la supro de la klifo. Jes ankoraŭ ĉi tie okazas aferojn kiel en le ĉefa tero. Sed iom pli rare. La etoso

de la civita milito en la tuta lando ankaŭ estas sentata ĉi tie sur la insulo. Estas milita bazo sur la insulo. Oni plenigas ĝin per politikaj malliberuloj. Ili estas alpremitaj en ĝi, vi komprenas ĉu ne? Mi ne pensas pri tiaj aferoj. Vinon, trinku vinon! Drinki fariĝas la homon forgeseman. Ĝi estas la patrino de ĉiuj belaĵoj. Hej, Religiemulo, venu, venu por saluti nian gaston. Ĉi tiu estas la Neinvitita Gasto. Kaj ĉi tiu estas la Fiŝkaptisto Religiemulo... Li iris ripari la pumpilon de la puto post la lumturo. Ĉu vi malvarmiĝis Religiemulo? Jen sidiĝu apud la fajrujo.

FIŜKAPTISTO RELIGIEMULO – Ne, patro gardisto!



Masko de
"La Fiŝkaptisto Religiemulo"

Vi scias kiom da marojn kaj kiom da ŝtormojn mi jam evitis. Mi al kutimiĝis al la malvarmeo. Bonvenon sinjoro gasto. Do, via boato frakasiĝis sur la rokoj. Kie vi ĝin ligis. Jes, jes, al la boathaveneto suben de la lumturo, ĉu ne? Ĉi tiu loko estas Pinto de Sorto. Bone. Morgaŭ mi helpos vin. Manĝu terpomojn! Ĉu vi ŝatis la supon? Bonan apetition! De kie vi estas? Ĉefa tero.... Ĉu vi loĝis sole en via boato? Vi forsendis viajn infanojn, kien? Eksterlande... Via edzino. Dio ripozigu ŝin en paco! Ĉu ŝi ankaŭ mortis dum la civila milito? Haa! Oni mortigas homojn kiel insektojn. Masakro, inundo, incendio, epidemio, malsato... Ni al kutimiĝis al tiaj katastrofoj. Ni kutimis preĝi por nia bona vivo sur ĉi tiu insulo. Sed ĝi ankaŭ fariĝas malbona. Kaj la murdo pasintsemajne! Ĝi estis malsimila ol ĉiuj tiuj murdoj... Strange, tre strange. Ĉu, kio estas stranga? Mi komencu el la komenco se mi ne ĝenos vin. Ĝi tre ĝenis min. Tio kio okazis al la edzino de la admiralo. Patro Gardisto kaj mi estis atestantoj antaŭ tri tagoj en la juĝejo. Mi rakontu... En tiu tago mi estis riparanta la fiŝnetojn. Mi estis sur boato en la marbordo riparanta la ŝiritan fiŝneton, kaj kantanta sole. La vetero estis sunbrila. La admiralo kaj sia edzino estis preterpasantaj. Lia edzino estis kolektanto de ŝtonoj. Sur la strando ŝi estis serĉanta interesajn ŝtonojn. Ili estis piedirantaj al la direkto de Smeraldo Golfeto. La admiralo demandis pri mia bonfarto. Li estis patreca viro. Li donacis al mi pakajeton de cigaredoj. Kaj sia edzino donacis al mi ĉokoladon. Ŝi estis bela virino, nobla kiel reĝino... Poste ili foriris. Pasis nur duonhoro kiam mi komprenis ke en mia ŝirmejo mankis kelkaj

aĵoj. Mi biciklis por iri preni ilin, kaj kiam mi estis post la lumturo mi aŭdis kelkajn kriojn. Ili estis virinaj krioj. Poste mi aŭdis kelkajn vangofrapojn, kaj ĝemojn... Poste alian krimon... Mi forlasis la biciklon kaj provis kompreni la direkton de la krioj post la cedro-arboj. La voĉoj ĉesiĝis. Serĉante mi trovis skarpon kaj kolĉenon surgrunde. Ĝi estis kolĉeno kun pendanta foto de la edzino de admiralo. Mia koro premiĝis. Ĉu tiuj krioj estis ŝiaj? Mi estis prava. Tiam mi aŭdis paŝojn. Iu eskapis. Li surhavis bluan ĉemizon, li estis mezalta viro, kaj mi vidis lian dorson sed ne lian vizaĝon. Kaj mi tiam malkovris, ke en la arbustoj estis... ene de tiuj arbustoj estis... etendiĝante kuŝanta la edzino de admiralo. Ŝi ŝajnis morta. La edzino de admiralo! Ŝi malfermetis la okulojn kaj direktis ilin al mi. Mi min sentis malbone kaj mi svenis. Kiam mi retrovis miajn sentojn la virino ne estis tie. Mi trovis mian biciklon sed ne ŝin. Mi estis tre maltrankvila. Ĉi tiu estis koŝmaro, mi vere vidis ŝin. Kaj la skarpo kun la kolĉeno estis en miaj manoj. Mi biciklis al la urbocentro kiam survoje mi vidis ŝin sur milita veturilo. Ŝi estis mizera kaj krianta. La veturilo haltis antaŭ la militbazo. Sur brankardo estis kadavro kovrita per tuko. Oficiro renkontis ilin, kaj iomete malfermis la tukon. Tiu estis la admiralo. Ho mia Dio! La admiralo estis morta. Tiu giganta homo estis morta. Mi komprenis ke tiu estis murdo. Ni ekrigardis unu la alian, ŝi rigardis al mi kun konfuzitaj okuloj. Sub ŝiaj belaj okuloj estis brunaj rondoj pro la plorado. Poste kiam oni serĉis atestantoj mi ankaŭ iris al la policejo kaj poste al la juĝejo. La admiralo estis milita komando kaj fortaspekta viro, tre alta, sperta en luktado. Tia malgranda homo ne povus mortigi lin tiel simple. Tion mi ne komprenas.

LUMTURO GARDISTO – Sinjoro, tiu ĉi malgranda viro havis ferpugnon. Mi scias lian Junecon. Ĉar li ĉiam portis ferpugnon kaj en ĉiu kverelo li vundis homojn per tiu aparato oni nomis lin FERPUGNULO. Oni diris, ke la murdon faris Ferpugnulo kaj tiu, kiun mi vidis similis al li, sed... Sinjoro lasu min rakonti tion al vi ekde la komenco. Tiun tagon la admiralo kaj lia edzino kune vizitis ankaŭ min. Kaj eĉ antaŭ ol nia kara Religiemulo. Ĉar la lumturo estas antaŭ ol la fiŝŝirmejo. Ĉiuokaze, ĉiumatene post matenmanĝo mi liveras mian gard-deĵoron kaj dormas frue. Tiun tagon mi matenmanĝis ĝissate, do, mi perdis mian dormemon. Antaŭ ol mi foriris hejmen mi perdis tempon farante kelkajn riparojn. Tiam venis la admiralo kun sia edzino. Ŝi estas bela virino, jes, sed mi ne multe ŝatas ŝin, ŝi estas aroganta. Mi opinias ke ŝi estas aroganta kaj kaprica. Mi kelkfoje vidis kiel ŝi

traktis la subordigulojn de la admiralo. Ŝi ŝatas min, sed mi ne ŝatas ŝin. Mi preparis po unu tason da kafo al ili. La admiralo demandis se mi bezonas materialojn por la lumturo. Estis kelkaj mankantaj aĵoj, kaj mi tion informis al li, kaj li promesis paroli kun siaj oficiroj. Provizaj aferoj ili estis. La admiralo estis afabla persono sed tiun tagon ŝajnis al mi, ke lia mieno estis maltrankvila... Mi ne scias, eble mi malbone komprenis tion. Poste ili foriris. La admiralo ekzamenus la ostrojn en la Smeralda Golfeto. Li estis homo scivolema pri naturo kaj maro. La virino estis kolektanto de koloraj ŝtonoj sed nur kiel ornamaĵojn en sia domo. Ŝi ne multe ŝatis la maron. Mi ne plilongigu la aferon... Post iliaj foriro mi faris kelkajn malgrandajn fendadojn. Tiam mi prenis mian binoklon kaj surgrimpis al la teraso por spekti la albatrosojn. Kiam mi rigardis orientdirekten de la lumturo mi vidis, ke la admiralo kverelis kun iu viro. Ĉar li estis giganta viro la alia viro ne estis bone videbla. Lia edzino estis spektanta el unu flanko. Se ili estus en la rango de mia pafilo, mi pafus al tiu viro por timigi lin. La kverelo iomete plilongiĝis ĝis tiam, kiam nebulo kovris la videblecon de mia binoklo. Mi kaptis mian pafilon kaj subeniris la ŝtuparon. Tage la nebulo estas eĉ pli malbona. Kiam mi atingis la lokon mi vidis, ke la admiralo estis morta. Estis malfacila rapidi ĉi tien kun mia kripla piedo. Kuru, kuru, kuru... Antaŭ ol la nebulo malhelpis mian videblecon mi dum unu momento vidis la viron sed mi ne certas se li estis la Ferpugnulo. Ĉu lia ĉemizo estis blua, aŭ griza? Mi ne certas. Miaj okuloj ne plu estas bonaj. Kompreneble kulpas la maljunuleco!

NEINVITIA GASTO – Kiu parto estas stranga? Unu mortigo kaj perforto okazaĵo... Jes, kordolora afero sed... en la ĉefa tero estas multaj tiaj okazaĵoj.

FIŜKAPTISTO RELIGIEMULO – Sed ĉiu rakontis ĝin malsimile. Homoj estis mortigitaj kiel insektoj en la ĉefa tero, eĉ ĉi tie en nia Trankvileco insulo... Prave... Sed ĉi tiu okazaĵo estas stranga... Homa spirito estas stranga... Ankaŭ la perfortulo rakontis ĝin alie.

FERPUGNULO – Mi estis sidanta kaj fiŝkaptanta




Foto de "La Ferpugnulo" algluita sur la frizista busto

sinjoro juĝisto. Mi estis sidanta sur roko, kaj ĝuanta la vivon. Mi neniun volis malutili. La maro estis trankvila. La admiralo kun sia edzino estis

preterpasantaj, kiam li demandis “Ĉu estas fiŝoj?” kaj mi respondis “Mi atendas ilin, mia komandanto”. Je tiu momento lia edzino kaj mi ekrigardis unu la alian. Ŝiaj hararoj estis kovrantaj unu el ŝiaj okuloj. Ŝi estis bela virino, bela kiel fazanino... ŝi estis kiel anĝelo, ŝi estis kiel satano... Ŝiaj okuloj estis invitaj... ŝi estis multe pli juna ol sia edzo. La admiralo povus esti ŝia patro... Mi multajn virinojn konas sinjoro juĝisto... brunajn, blondajn, blindajn, lamajn, nigrajn, sekajn, maljunajn, junajn! Mi scias eĉ la liveron de tiu kreitaĵo nomita virino! Tiu virino estis petolema! Fajroj en ŝiaj okuloj mi vidis. Posteee... poste.... sinjoro juĝisto kiam la admiralo demandis pri la ostroj mi tuj kreis mensogon por respondi. Mi diris, ke iom antaŭen, en la Krabo Rifo, mi vidis ŝelojn de migrantaj ostroj. Tiu viro estis tre scivolema pri ostroj. Mi profitis de lia scivolemo. Kondukante ilin al la rifo mi okulumis lian edzinon. En tiu momento multaj pensoj trapasis el mia cerbo. Al admiralo mi montris lokon inter du rokoj. Li kliniĝis al la grundo kaj tiam mi piedbatis lin sur la dorso, poste el mia poŝo mi elprenis la ferpugnon kaj metis ĝin en mia dekstra mano. La virino flankeniris. Ni komencis lukti kun la admiralo. Li estis maljuna sed malmola viro. Li ne estis tiel facile renversebla viro. Mi pugnobatis lian stomakon. Li kurbiĝis. Je tiu momento per mia alia mano batis lian nukon. Li svenis. Mi tute ne pensas ke li mortis, mi ne mortigis lin. Mia nomo estas fama pri tiaj aferoj, do oni suspektas min pro tio sinjoro juĝisto. La virino estis timigita. Mi kaptis ŝin el ŝia pojno kaj forkondukis ŝin al la arbaro malantaŭ la lumturo. Mi vidis anĝelon en ŝi. Mian vivon, mian mizeran vivon savis tiu virino. Mi alkondukis ŝin sub la cedro-arboj. Mi provis konvinki ŝin per agrabla mieno kaj vortoj. Sed poste mi ne povis malhelpi min, mi ankaŭ estas viro! Dio kreis tian virinon! Ŝi estis kiel onda maro, mi estis kiel boato sur ŝi. Ni multe balancadis, balancadis, balancadis... Mi petas pardonon sinjoro... jes, mi daŭros... Mi diris al ŝi, edzinigu min, post... nia afero. Mi forfuĝus kun ŝi al alia insulo, al alia loko. Tiu virinon Dio renkontigis kun mi. Mi diras la veron sinjoro, ke mi tiel sentis... la veron... Sed ŝi diris: Mi restis inter du viroj, mi ne plu povas rigardi al la vizaĝo de mia edzo... Vi malpurigis min.... Iru mortigu lin! Ŝi tion diris. Mi ne povas pluvivi kun tiu embaraso ŝi diris. Ŝi freneziĝis. Ŝi estis pli freneza ol mi. Jes, mi ja diris ke la admiralo svenis. Ankaŭ ŝi vidis tion. Ĉar kiam mi estis alkondukanta ŝin al la arbaro li surgrunde estis spiranta kaj ĝemanta. La admiralo estis ĝemanta. Li ne estis morta. Poste do... poste ni revenis kune kun ŝi tien, al la Krabo Rifo. Mi mortigus la admiralon. Mi ja diris al vi, ke tion petis ŝi. Sed ni vidis, ke la viro estis surgrunde kuŝanta kiel ŝtono. Li ne estis viro por mortiĝi pere de du simplaj pugnoj. Mi ĵuras ke mi ne

mortigis lin. Eble lia vivdaŭro estis je ĝia fino tiam, mi ne scias. Oni ĉi tie nomas min Ferpugnulo. Mi batis multajn homojn, rabis multajn, kverelis kun multaj sed mi neniam mortigis homon, sinjoro juĝisto. Mi ja diris, ke mia nomo estas konata. Ĉu la diamanta marista ringo kaj la horloĝo kun ora braceleto? Mi ne forŝtelis ilin. Ĉar alie la soldatoj kun la majoro kaj la kapitano kiuj arestis min trovus ilin en miaj poŝoj ĉu ne?... Jen ĉio ĉi! Kion plu mi rakontu al vi?

NEINVITITA GASTO – Kaj la virino? Ŝi estis la viktimo de la okazaĵo. Ĉu la juĝejo ne aŭskultis ŝin?

VIRINO – Tre malfacila... estas tre malfacila por mi



*Foto de la "Virino"
(edzino de la admiralo)
algluita sur la frizista busto*

rakonti tion al vi! Estas malbonodoro sur mi, kiun mi ne povas forigi. Ĝi estas la odoro de embaraso.... mi sentas, ke multaj insektoj ronĝas mian haŭton... Ni iris

promeni kun mia edzo tiun matenon. Ni iris al la Smeralda Golfeto. Tie, tiu viro estis fiŝkaptanta. Mia edzo demandis lin pri fiŝoj. Liaj okuloj havis sorĉantan mienon. Dubo kaj timo ekaperis ene de mi... Mi sentis, ke io malbono okazos al ni. Mi ne fidis lin. Li parolis pri diversaj ostroj. Ŝajne ili estis migrantaj ostroj... Mi estis kolektinta ŝtonojn por mia kolekto en mia domo. Mi aŭdis kriojn. Tiu homo estis luktanta kun mia edzo. Mia edzo estis bona militisto. Oni ne tiel facile povus tordi lian pojnon. Subite tiu viro batis lin kaj mia edzo kurbiĝis. Dum mia edzo estis ĝemanta mi kaj la Ferpugnulo ekrigardis unu la alian. Tiu estas lia nomo, ĉu ne? Mi volis forfuĝi sed li kaptis mian pojnon kaj altrenis min al la arbaro. Mi rezistis sed li portis min tien en siaj brakoj. Mi estis baraktanta. Tiu malbonodoro, tiu makulo sur mi ne forviŝiĝas. Ĝi spuros min ĝis apokalipso. Lia spirado... lia spirado... ĝi malbonodoris. Ĉu mia edzo? Mi pensas, ke li tuj finspiris tie. Mi ne memoras. Mi nur memoras lian falon kaj liajn ĝemojn. Malsana estas tiu viro! Li mensogas. Li seksperfortis min. Mi turniĝas ene de granda kirlo... Kirlo! Ve, al ĉio ĉi kio okazis... Ne estu tia sorto! Mi perdis ĉion, mi perdis... mi petegas forkonduki min de ĉi tie. Mi ne volas vidi lin.

NEINVITITA GASTO – Do la virino rakontis la veron. Tia malbonulo ne rakontus aliojn ol mensogoj.

LUMTURO GARDISTO – Se oni ne invitus la spiriton de admiralo povus esti, ke ni je tio kredus. Sed la spiritisto alvokis lian spiriton kaj tiam ĉio ŝanĝiĝis.

SPIRITO DE ADMIRALO – Mi nun rememoras la rigardon de mia edzino.... Tiun matenon ni eliris el la domo post kverelo. Jam estis multaj jaroj, ke ni ne povus vivteni nian edziĝon. Por ke oni ne komprenu la veron ni ĉiam rolludis. Ŝipo de edziĝo... malpuraĵoj volviĝis al la heliko de tiu ŝipo, ne estis eliro. Mi nun rememoras la rigardon de mia edzino... Je tiu tago mi ne irus al la militbazo. Estis libera tago. Ŝi volis kolekti ŝtonojn el la marbordo. Ŝi ŝatis la



Foto de la "Admiralo" por reprezenti lian spiriton algluita sur la frizista busto

kolorigitajn, aliaspektajn ŝtonojn. Ni unue vizitis la Lumturo-Gardiston. Poste en la Smeralda Golfeto ni renkontis tiun viron. Antaŭ ol ni forlasis la domon mi glutis mian pilolon por sangopremo. Tiu estis nova marko, ka ne tiu, kiun mi uzis antaŭen. Eble ĉi tiu nova pilolo estis iom peza por mi... Ni atingis la rifojn. Mi kliniĝis kaj tiu viro estis malantaŭ mi. Subite li piedbatis min surdorsen. Por ne fali en la maron mi provis salti maldekstren. Kiam li provis veni sur min, mi per unu piedbato faligis lin. Kiam mi leviĝis, li jam estis surmetanta ferpugnon. Mi nun rememoras la rigardon de mia edzino. Ĝi estis plena je malamo... Malnova amiko de mi, oficiro, avertis min dum mia eziĝfestoj. Li diris ke en la dua edziĝo oni devas trovi trankvilecon, kaj oni ne devas edziĝi kun tre juna virino. Oni ne povos sekvi kaj atingi tian junan edzinon! Tiu virino, kiu nun ploras en via juĝejo, ne estas la sama virino kiu estis tiam en la tago de nia edziĝfestoj. La plej grava armilo de virino estas ŝiaj larmoj. Mia amiko tion ja diris; malico de virino povas eĉ faligi armeojn. Ĵus antaŭ ol mi malligis la ŝnuregon de mia ŝipo el tiu mondo, mi luktis kun tiu homo. Mia edzino estis ordonanta al li, "Mortigu lin! Mortigu lin!"... Ŝajnis, ke ŝi freneziĝis... Tiom da venĝo, tiom da malamo! Min trafis la mia plej proksimumo. Kaj pro tio? Kial? Kion mi faris al ŝi? Luktante mi sentis malĝojon, kaj kiam mi ricevis la baton de ferpugno en mia stomako, la veneno de ŝia perfido kvazaŭ elverŝiĝis el mia nuko suben. Kiu estis tiu viro? Kiu estis mia edzino? Aŭskultante iliajn voĉojn dum ili iris sub la

cedro-arbojn, mi estis kuŝanta dors-al-teren kaj estis rigardanta al la ĉielo por la lasta fojo. Nebuliĝis, forviŝiĝis la ĉielo kaj mi enmiksiĝis en la mallumo. Ĉu mi estis malbenita aŭ savita? Kial mi meritis tian morton? Justeco de ĉi tiu mondo estas blinda. Tiu, kiu faras bonon ne ĉiam ricevas bonon. Jen tio, kio okazis en via mondo, kiun mi forlasis. Mi nun rememoras la rigardon de mia edzino...

NEINVITITA GASTO – Ĉu vi diras, ke la juĝejo konsultis la ateston de iu spiritisto? Ne diru tion! Ne moku min uloj!

FIŝKAPTISTO RELIGIEMULO – Ne la ateston de la spiritisto, sinjoro, sed la ateston de la spirito... La spirito ekparolis. Ni vidis la vizaĝon de la admiralo ene de la mallumo. Mi ĵuras ke ni ambaŭ estis atestantoj de tio. Mia kredo ja ne akceptas tiajn aferojn. Sed la spirito ja alvenis. Por ke la afere solviĝu la juĝisto volis tiun. En la Trankvileco Insulo tio okazis por la unua fojo! Mi pentas, mi pentas! Eble ĝi estis faro de satano. Spiritistoj kunlaboras kun satanoj. Sed ni ĉion ĉi aŭdis sinjoro.

NEINVITITA GASTO – Kaj kion verdiktis la juĝisto? Ĉu li verdiktis laŭ la spirito de la admiralo?

LUMTURO GARDISTO – Li diris, ke la juĝo estas senverdikta. Tio estis lia decido. La Ferpugnolo ne estis serioza homo, la virino ploris, ĝemis, mi ne ŝatis ŝin, do eble ŝi rolludis. Kaj la spirito diris la samon. Stranga okazaĵo ĝi estis, kiel nia Religiemulo jam rakontis...

FIŝKAPTISTO RELIGIEMULO – Patro Gardisto, la virino estis nobla. Tiu virino ne mensogus.

LUMTURO GARDISTO – Kiu povas kompreni la spiriton de la virino. La vorto virino signifas konduki komplekse, ĝi signifas nebulemon, ĝi signifas malklarecon.

NEINVITITA GASTO – Forlasu agaĉon pri tiu virino! Ni komprenis, ke vi ne ŝatas ŝin! Sed kial perfortita virino mensogus?

LUMTURO GARDISTO – Se ŝi estis perfotita... Mi iam aŭdis, ke ŝi havis rilaton kun oficiro en la militbazo. Soldato diris tion al mi. Do, mi estas lia mesoganto. Tio estas... tiu okazaĵo... eble... iu dubo estas... Mi ne scias... Sed Dio scias ĝin, ĉu ne Religiemulo? Ho mi volas pisi. Ekde vesperiĝo mi daŭre trinkas ion. Mi iros

piŝi kaj tuj revenos sinjoroj! Malbena al ĉio!

FIŜKAPTISTO RELIGIEMULO – Patro Gardisto, Patro gardisto, kio okazis al vi? Vi malbone vundis vian frunton! Supre en la farmacia kesto devas esti alkoholaĵo. Mi viŝos ĝin tuj. Atentu, atentu, jen tiel! Donu al mi ankaŭ vian alian manon! Apogu vin sur mi! Jes! Sidiĝu ĉi tie! Ho, io falis sur la planko. Ĝi estas horloĝo... Ĉu tiu ringo estas via? Ĉi tiu diamanta ringo? Ĝi havas signon de ankoro kaj glavo sur ĝi... Ĉu ĉi tiu ne estas la perdita ringo, pri kiun la jugisto daŭre pridemandis? Horloĝo kun ora baceleto... tiu de la admiralo...

NEINVITITA GASTO – Ĉu vi ne diris, ke ĉie estis nebulo?! Sed vi tiujn ja vidis! Kio estas le malsimileco inter vi kaj la Ferpugnulo?

LUMTURO GARDISTO – Ne kulpigu min sinjoro! La viro estis morta. Mondaj aĵoj restas en ĉi tiu mondo. Kion li farus kun ĝi post sia morto? La admiralo estis riĉa homo, kun multaj koncesioj. Mi, dum kiom da jaroj, suferas en ĉi tiu lumturo. Nur unufoje en mia vivo, kaj tiam ĉi tio, kiun mi forprenis, estas unu peceto de oro kaj diamanto, Ĉu ĝi estas troa? Hej... ĉu ĝi estas troa?

FIŜKAPTISTO RELIGIEMULO – Ho Vi patro Gardisto! Ho vi! Vi pekas...

LUMTURO GARDISTO – Ĉu ĝi ne estas malpli granda peko ol kaŝe okulumi homojn? Do.... Ĉu tiu estas mensogo? Mi scias vian mienon. Vian sekreton mi tenas. Ĉu mensogo? Ĉu mensogo? Eble kiam tiu virino estis perfortita vi kaŝe okulumis ilin. Aŭ se ili estis amindumantaj... Ĉiuokaze! Ĉu vi estas malpli peka ol la Ferpugnulo? En via lango ĉiam estas Dio. Vi perversiulo!

FIŜKAPTISTO RELIGIEMULO – Ssss ssss silentu patro Gardisto! Mi ĝis nun neniam malrespektis vin. Silentu, ne kulpigu min apud la gasto!

NEINVITITA GASTO – Momenton! Ĉu tiu ne estas ploro de bebo?! Ho bebo, ho bebo... Kiu forlasis vin ĉi tie? Kia patrino perdis esperon je vi. Ve, mia ido! Atentu, atentu, ne ploru! Baj... baj... baj... Volvu lin, jen tiumaniere! Do ankaŭ vi haltu la voĉojn! La nebulo disiĝas. Jam komenciĝis la tagiĝo. Min ĝenas viaj malsanaj rakontoj. Ĉu ne restis vera homo? Ĉio putriĝis... Mi forboatiĝos de ĉi tie... Mi ankaŭ prenos tiun bebon kun mi. Kiu ajn estu ĝia patrino! Tiu putranta mondopatro ne helpas ĝin. Eble ĝi estas iu selhelpa bebo. Mi dankas vin por la manĝaĵo. Aŭ vi ĉiuj nokte formas tiajn strangajn rakontojn, aŭ la mondo ja fariĝis stranga. Mi trovos pli belan lokon por mi kaj por ĉi tiu senkulpa bebo... Mi kredas, ke ankoraŭ estas lokoj kiuj ridetas al homoj...

FINO

Tradukis: Vasil Kadifeli

Koloroj el diversaj popoloj

En hinduismo **सरस्वती** (sarasvatī) estas la diino de scio, arto, scienco, literaturo kaj muziko. Ĉiujare je la kvina tago post la novluna tago inter la mezo de januaro kaj tiu de februaro (ĉi-jare je la 1-a de februaro), oni speciale adoras tiun diinon en Barato, precipe en la ŝtato de Okcidenta Bengalo.



Hinduj/Barato



Preskaŭ en ĉiu hejmo, en ĉiu lernejo, en ĉiu scienca kaj arta institucio, oni celebras tiun feston ekde la mateno kun veda mantraj, floro-dediĉo al la diino:

<https://www.youtube.com/watch?v=zEMH5r3NI9M>



Interese estas vidi, ke bengala infano ekkaptas kreton ('hāte khorī') kaj ceremonie komencas skribi la literojn ekde tiu tago kun la beno de diino antaŭ ol iri al bazlernejo:

<https://www.youtube.com/watch?v=Bi7FUxemrE0>



Raportis nia kara amiko
Prodip el Barato.


2. Transnacia edukado

DUNCAN CHARTERS - Profesoro pri fremdaj lingvoj

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas, ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

PENSU PRI LA INSTRUADO kiun vi ricevis pri la mondo en via elementa lernejo kaj poste. Rigardu la edukadon kiun ricevas nun viaj infanoj kaj la infanoj de viaj najbaroj. En la lastaj jardekoj, konscio pri la interdependeco de la mondaj nacioj vastiĝis ĝis preskaŭ universala akceptiĝo. Naskiĝis Eŭropa Unio, funkciadas Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj politikaj, humanismaj kaj komercaj entreprenoj sur plej diversaj kampoj, kaj vojaĝantoj ĉiam pli senĝene konatiĝas kun la plej foraj partoj de sia tergloba hejmo. Sed kiom progresis la preparado de niaj infanoj por la eĉ pli senlima mondo kiun ili spertos en la tria jarmilo?



Sur la infanajn cerbojn presas mispensojn la edukistemo kaj tiu infanaĝa premo por naciismo ilin dresas.

La fieduko tre sukcesas – ĝangale kreskas tiu semo; sur la infanajn cerbojn presas mispensojn la edukistemo.

La diferencojn oni jesas, silentas pri l' similoj – emo, en kiu fontas la problemoj; kaj mison, kies fort' ne ĉesas, sur la infanajn cerbojn presas.

1954 03 29 William Auld

lernis, kun la longa listo de reĝoj kaj reĝinoj kaj aliaj elstaraj (plejofte politikaj) personecoj. Pri eksterlanda historio ni informiĝis nur poste, laŭ la rilatoj de nia

lando kun la ekstera mondo: pri la ekskolonioj, inkluzive Usonon, kies loĝantoj maldankeme kaj malĝentile ribelis montrante sian necivilizan karakteron, kaj pri la geografie apuda Eŭropo, kies loĝantoj ne ĉiam kondukis laŭ la normoj karakterizantaj civilizan demokratecon. Kiam mi kaj miaj kun-klasanoj fine eklernis la francan lingvon, ni sekvis longan tradicion, kiu daŭras ĝis hodiaŭ; temas pri tradicio bazita sur kriterioj de kultura kaj diplomacia historio kaj geografia proksimeco sed ne ĉiam sur reciproka respekto.

Mi fariĝis patro de du usonaj filinoj. En sia lernejo ili konatiĝis kun usonaj ŝtatoj, prezidantoj, pravigoj de fiera sendependiĝo disde la iamaj britaj koloniaj mastroj. Mi rimarkis ke pli ol 95% de la enhavo de iliaj lecionoj estas malsama je tio, kion mi spertis. Mi iam faris simplan demandon al lernejestro, ĉu la instruisto en siaj lecionoj/klasoj kovros ankaŭ materialon pri la historio kaj sociaj sistemoj de landoj ekster Usono. Li, tute neĝenite, respondis, ke tio estus efektive bonega ideo. Tamen laŭ li mi certe konsentus ke, ĉar mankas tempo por fari ĉion, plej bone estus lerni pli detale la propran kulturon ol havi supraĵajn konojn pri aliaj, kaj eble konfuziĝi! Se miaj filinoj elektos studentigi en mia universitato, ili devige studos du kursojn de literaturo. El la du, unu povas esti la literaturo de alia lingvo kaj kulturo. Sed, ĉar tio estas laŭelekta, kaj ne multajn kursojn oni proponas, preskaŭ ĉiuj studentoj plenumos sian devon legante nur el la angalingva literaturo de la usonanoj kaj britoj.

Mi konas alian lernantinon, kies gepatroj donis al ŝi la sperton ne nur lerni Esperanton sed ankaŭ vojaĝi kaj korespondi per ĝi. En siaj lecionoj pri sociaj studoj, ŝi por siaj studprojektoj utiligis preskaŭ cent malsamajn kontaktojn en landoj tra la tuta mondo. Tiel ŝi informiĝis pri la sintenoj kaj perspektivoj de alikulturaj gejunuloj kaj informis sian samklasanojn pri ili. Ne nur impresiĝis ŝia instruistino kaj aliaj instruistoj, al kiuj ŝi rakontis sian sperton en profesia konferenco, sed ŝi mem intelektite tiom profitis de la lingva kaj kultura lernosperto, ke ŝi povis elekti el inter la plej prestiĝaj universitatoj de la lando por siaj postlernejaj studoj.

“Nia morgaŭa mondo devos nepre esti trans- etna kaj transnacia, ĉar la neeviteblaj ŝanĝoj [...] donis tiel urĝan impeton al tio...”

Esperanto estas lingvo de tiu, kiu posedas ĝin

Ne nur la propra lando, sed la tuta terĝlobo fariĝis la hejmo de tiu junulino. Nenion ŝi perdis, ĉar la laboro kiun ŝi faris respondis al la propraj intereso, kaj ĝuste tio motivigis ŝin por nature kontentigi la scivolemon kaj lerni pli. Ŝi ne ricevis nur la perspektivon de instruisto kaj materialoj el la propra lando, en la propra gepatra lingvo. Unike plivastiĝis ŝiaj horizontoj kaj tiuj de ĉiuj membroj de la klaso. Ĉu tio estus okazinta simile per lecionoj pri fremda lingvo kaj kulturo? Efektive ne, pro multoblaj kialoj. Unue, kiam oni lernas en lernejo pri alia lingvo kaj kulturo, plejparte oni lernas la lingvon mem kaj ne havas la okazon ĝin utiligi por vere komunikiĝi kun la parolantoj de tiu lingvo kaj informiĝi pri iliaj ideoj kaj kulturo. Pro la malfacileco de la tasko, oni ofte lernas rezisti ne nur la lingvon sed ankaŭ la kulturon de ĝiaj parolantoj. Due, lecionoj pri fremdaj lingvoj preskaŭ neeviteble instruas pri diferencoj inter la kulturoj kaj iliaj reprezentantoj, kio plue fremdigas la lernantojn de la alia kulturo, ĉar ili sentas sin komfortaj en la sia, kaj emas kompari negative la alian kulturon kun la propra. Eĉ se la instruado sukcesus tiurilate, la mondo de la lernanto restus limigita al nur du kulturoj, tiel ke ĝi povus rezultiĝi tute falsan senton pri larĝeco de vidpunkto kaj kompreno pri aliaj kulturoj. Trie, la edukado per Esperanto, esence ne-etna lingvo, havas tute alian rezulton. Lernantoj komunikas per la sama lingvo je la sama psiĥologia nivelo. Esperanto estas lingvo de tiu, kiu posedas ĝin, ne de alia fremda grupo, kiu ĉiam regos ĝin pli bone ol ni. Do la lernantoj ne timos per eraroj perdi la respekton de denaska parolanto de la lingvo, kiun ili strebas uzi precize, tamen neniam sciante ĉu ili vere ĝin uzas ĝuste aŭ ne. Kvare, kaj eble plej grave, tiu samnivela interŝanĝado de spertoj kaj ideoj reliefigas ne la eble amuzajn sed relative malgravajn diferencojn inter la kulturoj, kiel kutime okazas en la instruado de fremdaj lingvoj. Kvankam ankaŭ tiujn ili ne preteratentos, la lernantoj nature ekkomprenos la universalajn valorojn, kiuj estas komunaj al ili, kaj kiuj ligas ilin ĉiujn al la aliaj. Ili pli emos ekhavi sentojn de pacemo, respekto, amo, kaj ĝuon pri la interrilatoj kun aliaj gejunuloj kiuj efektive havas tre similajn spertojn, dezirojn kaj aspirojn kiel samaĝaj membroj de la homa raso.

Surbaze de tia reciproka interkompreniĝo, la lernantoj, gvidate de la instruisto, havos la eblecon ekzameni siajn antaŭjuĝojn kaj etnajn sintenojn, ankaŭ interne de la propra socio. Ili povos kompreni, ke "historio" ne estas simple objektiva katalogado de datoj kaj

okazintaĵoj, kiun oni jam esploris kaj kiun ĉiu normala persono senpense akceptas. Sub tiaj kondiĉoj etna historio povos klare montri sin kiel subjektivan perspektivon de difinita popolo pri sia pasinteco kaj identeco en la hodiaŭa mondo. Tio inkluzivus ne nur pozitivajn strebojn por vivteni sin kaj gajni internan kaj eksteran respekton, sed la negativan tendencon malestimi kaj batali kontraŭ popoloj, kiuj ŝajne minacas nian pozicion. Oni povas kompari kiel oni traktas difinitan politikan aŭ historian problemon en landoj, kiuj havis historiajn rilatojn, ekzemple britoj kaj hispanoj pri la konfliktoj de la deksesara jarcento, kaj usonanoj kaj meksikanoj pri la teritoriaj rajtoj de la du nacioj en la moderna epoko.

Nia morgaŭa mondo devos nepre esti transetna kaj transnacia, ĉar la neeviteblaj ŝanĝoj en internaciaj rilatoj donis tiel urĝan impeton al tio, ke postlasiĝis la eduksistemoj. La teĥnologaj rimedoj jam ebligis tujan kaj facilan internacian komunikadon. Per la utiligo de reta teĥnologio aldone al la jam etenditaj vojoj, la internacia lingvo povos malfermi eĉ pli vaste la pordon al vera senpera transnacia edukado. Por tiu celo la lingvo estas la sola kiu povos plene subteni la deziratan progreson. Nur per Esperanto ĉiu lernanto povos sen granda prokrasto transiri de lingvolernado al lingvouzado. Nur per la lernado de Esperanto ĉiu ricevos la ĝojon konstrui ponton al respekto de reprezentantoj de ĉiuj etnaj lingvoj, nacioj kaj kulturoj surbaze de nia komuna homeco kaj homfrateco.

(daŭrigota)

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS
Komentoj pri la Manifesto de la movado
por la internacia lingvo.
Publikigita de UEA, Rotterdam 1999



"Ĉar la militoj ekestas en la homaj mensoj, same en la homaj mensoj estu pretigitaj la defendoj de la paco."

El la Konstitucio de Unesko



Iniciato por progresigi retajn kursfinintojn

La retejo Edukado.net kun ĝojo informas, ke la 4-an de januaro ekfunkciis ĝia nova projekto EKPAROLU! Post 150 provsesioj kaj seriozaj planado kaj konstruo de facile administrebla kaj uzebla programaro ni ebligas al komencintoj havi 10 senpagajn parolsesiojn. Ni volonte akceptas pliajn GEONKLOJN, kiuj post mallongaj testado kaj trejnado povus paroligi la GENEVOJN. Geonkloj estas spertaj kaj helpemaj esperantistoj, espereble kun iom da sperto pri instruado kaj iom da libera tempo. Ili mentoras la genevojn – tio estas retaj kursfinintoj, kiuj en multaj kazoj neniam parolis la novan lingvon kun vivanta esperantisto. La projekto estas bona okazo spertiĝi pri distanca instruado, kaj esti utila en la enmovadigo de novuloj. Ĝi bele kontribuas al la plenumo de la celoj de la Jaro de la Lernanto proklamita kune de UEA kaj ILEI.

Legu pli ĉe la paĝo:

<http://edukado.net/novajhoj?id=672>

Atendas viajn vizitojn kaj sinproponojn por geonkliĝo la redaktoro de edukado.net Katalin Kováts

Fonto: **Esperanto Revuo, n-ro 1309(1), januaro 2017**



Ĉu neandertalaj homoj kapablis paroli?

La centra osto kiu necesas por parolkapablo - la langa osto - precize samaspektas ĉe niaj fruaj fratoj kiel ĉe ni modernaj homoj.



Antaŭ proksimume 100.000 jaroj la demando pri ekesto de lingvo ne stariĝis, ĉar ne ekzistis lingvo. Tiu alvenis nur poste per unusola homo kiu estis reorganizinta sian cerbon. "Nomu lin Prometeo!" Tiel Noam Chomsky kiu regis per sia denaska gramatiko la lingvistikon dum duona jarcento, imagis la historion ankoraŭ dum la jaro 2010. Nur ni "modernaj homoj", tiel nin nomas la antropologio, posedas lingvon, ĝi ekestis antaŭ 100.000 ĝis 40.000 jaroj per unu bato.

Sed izolita Prometeo verŝajne estus havinta malfacilaĵojn, kaj nenio falas de la ĉielo en la evolucio. Do kiam ĝi ekestis, la lingvo? Ĝi bezonas konstruelementojn en la homa korpo, nome la tutan anatomian aparaton kiu ĝin ebligas, kaj la genojn kiuj stiras ĝin. Tiuj genoj eĉ ĉe ni modernaj homoj estas ankoraŭ grandparte nekonataj, ni havas por tio

centran kandidaton, Foxp2. Tiu geno ofte aperas ĉe bestoj, sed ni posedas ĝin je speciala varianto. Oni kredas ke ĝi ebligas kaj la lingvon kaj la paroladon. Sed ne nur ni posedas tiun varianton, ankaŭ la neandertaluloj havis ĝin.

Sed sola geno kompreneble ankoraŭ ne povas krei la parolkapablon, unue necesis konstrui kompleksecan vokalan mekanismon en la gorĝo. Tion ne posedas ekzemple la ĉimpanzoj. Kelkaj el ili en kaptiteco ja lernas specon de parolado, nome per gestoj, sed ne per voĉo. Tio eble estas kaŭzita de la fakto ke ĉimpanzoj kaj aliaj primatoj havas ĉirkaŭ la laringo grandajn aersakojn. Pri kiuj ili servas, tion oni ne scias, sed oni supozas pro bonaj kialoj ke aersakoj malhelpas la prononcadon de kompleksaj sonoj.

Iam dum la evolucio tiuj aersakoj malaperis: Nia tute frua praulo, Australopithecus ankoraŭ havis ilin, sed ĉe la Homo heidelbergensis - la supozeble komuna praulo de homo sapiens kaj neandertala homo - antaŭ 600.000 jaroj ili ne plu aperis. Kompreneble ankaŭ la neandertaluloj ne posedis ilin. Kiel oni volas scii tion? Aersakoj ne estas ostoj kiuj konserviĝas kiel fosilioj. Oni povas rekonkludi de alia osto, la langa osto, kiu estas la sola osto en la tuta korpo kiu ne estas kunligita kun alia osto, sed sur kiu fiksiĝas tendenoj kaj muskoloj per kiuj la lango estas stirata.

Por tio la langa osto servas nur kiel peranto, la reganto de la parolado sidas en la cerbo. De tie devas elsendiĝi la instrukcioj, ekzemple al la spirado. La

spirado estas stirata ĉe aliaj primatoj de la pulmo, sed kiu volas paroli, tiu devas malnodiĝi de tio. Tio funkcias trans nervaj kondukiloj kiuj postlasas spurojn en ostoj - ĉe la neandertaluloj la samajn spurojn kiel ĉe ni.

Ankaŭ la langa ostoj de la neandertaluloj apenaŭ distingeblas disde la nia - ĝi montriĝis en la jaro 1983 ĉe "Kebara 2 Neanderthal", kio estas 60.000 jarojn aĝa trovaĵo en Israelo. Pro tio ekestis spekulacioj pri la parolkapablo de la fruaj fratoj, sed oni malentuziasmiĝis. Nur se io ekstere aspektas egale, ĝi ne aŭtomate havas la saman funkcion. Sed ĝi ne nur ekstere aspektas egale. Usona esploristo per rentgenaj metodoj analizis la internon de la Kebara-ostoj, ĝian fajnstukturon. Ĝi ne nur simple kreskas, ĝi estas modifita kaj rekonstruita per la uzo de la lango. Kaj tiu rekonstruo okazis precize same kiel ĉe ni modernaj homoj.

Malklaras tio ankoraŭ ĉe langaj ostoj de homoj heidelbergensis el Hispanio de antaŭ 530.000 jaroj. Ankaŭ tiuj langaj ostoj similas al nia. Sed ion alian oni jam scias pri tiuj homoj: Al konversacio apartenas ne nur la parolado, sed ankaŭ la aŭdado. Kaj la oreloj de la heidelbergaj homoj estis konstruitaj kiel niaj, kaj klare tute alie ol la oreloj de ĉimpanzoj: Ili estas aparte sentivaj por la frekvencaro ĉe unu kaj ĉe ok kilohercoj, malpli en la frekvencaro du ĝis kvar kilohercoj. Kaj pri tiu frekvencaro niaj oreloj specialiĝis, kaj tio estas la frekvencaro de la akustika informo de la lingvo.


Fonto :

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2014/04/cu-neandertalaj-homoj-kapablis-paroli.html?view=flipcard>

(Vi ankaŭ povas aŭskulti tiun tekston en la sama ligilo)

Reenkarniĝo

Facila



Reenkarniĝo

– ... Kaj... se vi volas, vi homo estos!

– Ĉu homo?... li meditis ... komence mi estis ŝtono, homo venis kaj disseĝis min por konstrui

al si loĝejon, poste mi estis arbo, oni venis kaj mortigis min per akra ilo kaj poste bruligis min en fajro, poste mi estis fiŝo, homo trompinte kaptis min kaj manĝis. La sekvantan fojon... Mi ne plu memoras... Ha ! Post tio mi estis rinocero kaj oni murdis min pro amuzo, eĉ kiam mi estiĝis lago, homoj venis kaj venenigis min. Kio estis poste?... Mi estis skarabo kaj knabo trapikis min per akra kudrilo. Min mortadis longe. Poste mi fariĝis floro kaj loĝis en lia hejmo, sed li forgesis pri mi kaj mi mortis pro manko de akvo. Eĉ kiam mi estis kato, eta homo strangolis min per ŝnuro. Kiam mi estiĝis formiko, oni bruligis min vivantan per ronda vitro... Patro! Vi ja diris al ni, ke ni devas ami homon. Sed kial li estas tiel kruela ? Por kio ili suferigas nin?

– Infano mia, tio estos via lasta enkorpiĝo en tiu ĉi mondo. Poste vi pluiros. Se vi volas ekscii respondojn al viaj demandoj, vi scias kion necesas fari.

– Sed mi nenion rememoros tie, sur la Tero. Nenion el miaj pasintaj vivoj.

– Jes.

– Kaj, eble, mi iĝos la sama kiel tiuj, kiuj murdadis

min?

– Eble

– Hm... Bone. Tiam mi fariĝos...

– ... Juĝato... Ĉu la kondamno estas komprenita de vi?

– Jes, komprenita

– Apelacion de la verdikto vi povos fari dum en determinita templimo. Sed... verdire, por murdo de kvardek homoj, vi tutegale estos pafekzekutita, malgraŭ ĉiuj viaj apelacioj. Kaj ankoraŭ... mi ĝis nun ne komprenis vian motivon. Vi ja ne estas frenezulo, juĝa ekspertizo tion agnoskis, diru al mi, por kio vi ilin murdis?

La viro malice ridetis.

– Mi ne scias. Al mi ŝajnas, ke mi ion rememoris...

Евгений ЧеширКо (Evgenij ĈeŝirKo)
El la rusa tradukis Dmitrij Morozov



Aŭtuna scenejo: eta stacidomo de urbeto norde de Viĉenca, en nordorienta Italujo inter Verono kaj Venecio, dek

kilometrojn malproksime de la domo de miaj gastigantaj parencoj, pli-malpli je la naŭa matene. La malgranda stacidomo troviĝas meze de tutebena kamparo for de iu ajn domo. La ĉielo estas hele griza; aŭdeblas pepado de birdoj kaj, de malproksime, brueto de trafikigata aŭtoŝoseo.

La pordoj kaj fenestroj de la stacidometo estas fermitaj kaj la loko estas tute senhoma; ĝin ja vizitadas nur laboristoj je fiksitaj horoj por veturi al kaj el la urboj. Flanken irante mi atingas la kajon inter la konstruaĵo kaj la ununura trako, kiu rekte etendiĝas norden kaj suden tra la kamparo. Mi venis ĉi tien por atendi esperantistan amikon. Mankas ankoraŭ 20 minutoj al la alveno de la elsuda trajno, kiun mi atendas. Por min sidi, mi alproksimiĝas al la benko apud la stacidoma muro kaj tiam mi rimarkas sur ĝi, nigran ŝtofvalizeton, ŝajne ujon por filmokamerao aŭ profesia fotilo.

Je la unua momento mi hezitas tuŝi la forlasitan objekton sed tuj poste, perceptante, ke mi ne troviĝas en Israelo, scivoleme mi zorge malfermas la ujon kaj eltiras tute novan filmokameraon, kiu ŝajnas al mi tre konata. Nekredeble! Esplorante la aparaton mi iom ŝokiĝas, ŝajnas al mi sonĝi: temas pri sufiĉe multekosta duonprofesia filmokamerao ĝuste la modelo, kiun antaŭ mia veturado al Italujo, mi decidis aĉeti je mia reveno hejmen. Mi malrapide spiras plenpulme, repakas la aparaton, decidante senhezite transdoni ĝin poste al la policejo de proksima urbeto.

Dum mi pripensas la surprizan strangan koincidon, el la nordo aperas trajno. Ne temas pri la trajno, kiun mi atendas, ĉar ĝi venas el la kontraŭa direkto. Apenaŭ ĝi haltas kaj la aŭtomataj pordoj malfermiĝas, ununura pasaĝero elsaltas el ĝi: tre bela blonda juna knabino, verŝajne dudekjaraĝa aŭ iomete pli, kun senspiriga perfekta silueto, je sensacia minijupo. Kia rava apero! Verdire, mi ĉiam ŝategis blondulinojn, aparte tiuj, kies hararkoloro nomiĝas "venecia blondo", kvankam mi poste, kaj feliĉe, edziĝis kun nigregaharara virino.

Ŝi aperas tre maltrankvila, dum senspire kuras al mi!

Mi kvazaŭ blindigita admiras ŝian sveltan paŝadon: ĉu temas pri sonĝo? La knabino atingas min, preskaŭ ekparolas al mi, kiam ŝia rigardo falas sur la nigran valizeton apud mi; ŝi tuj plene malstreĉiĝas kaj feliĉe ekkrias "Ho! Dank' al Dio!", profunde spiras pro senpeziĝo kaj sidiĝas apud mi.

Ridetante, ni nin prezentas parolante la venetan dialekton kaj Ĝiulia, tiel ŝi nomiĝas, tre kontenta paroli dialekte, simpatie kaj tumulte klarigas al mi la tutan aferon. Ŝi perlaboras kiel filmmuntisto en la norda urbo kaj ĉiutage veturas al ĝi per la trajno de la sepa matene. Hieraŭ vespere ŝi kunportis hejmen la aparaton por fini iun urĝan taskon. Ĉi-matene, atendante la trajnon, ŝi sidiĝis sur la benko kaj apogis la kameraon apude. Lu vokis ŝin poŝtelefono. Enorbita en la konversacio, ŝi suriris la trajnon forgesante la valizeton.

Nur proksimiĝante al la urbo, sin preparante por elvagoniĝi, ŝi ekrimarkis la forgeson. En la urba stacidomo, tute streĉita, ŝi apenaŭ sukcesis kapti alian trajnon por reen veturi. Post unu horo de maltrankvila zorgego, ŝi atingis sian elirpunkton kaj... retrovis apud mi la valoran valizeton.


Ŝi kore kaj varme dankas kaj redankas min. Kiam mi rakontas pri mia intenco transdoni la valizeton al la plej proksima policejo, ŝi sincere flatas min deklarante, ke eĉ en la kamparo nuntempe malofte oni renkontas tiom honestan homon!

Nu, bone! Kvaronhoron ĝoje kaj simpatie, tiu rava kanabino kaj mi, tute solaj sur benko en tiu izolita stacidometo, dialekte kaj intime babiladas pri filmado kaj filmmuntado, interŝanĝas fakajn spertojn kaj amuzajn travivaĵojn, ĝis kiam... bedaŭrinde, aperas la elsuda trajno, kiu portas mian samideanon kaj rekondukas la knabinon al la norda urbo. Ĝiulia kaj mi bondezirigas unu al la alia sukceson kaj ĉion bonan.

Subite, ŝi varme kisas min survange kaj forkuras al la trajno. Kompreneble ŝi kisas min kiel patron, aŭ plej verŝajne kiel avon! Domaĝe! Eble en alia tempo... antaŭ iom da kelkdekoj da jaroj... sed ĉiam oni rajtas revii! Sendube, post tiel emociiga malfermo, mi certas, ke la tago estos neforgesebla. Kaj vere tia ĝi estis!

Fonto: (ankaŭ aŭskultebla)

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2016/12/reala-travivaĵo-au-songo.html>



Eble kelkaj konsulejoj helpas al la junuloj, kiujn trafis bato de la sorto, sed ne tiulanda.

“Ne estas nia tasko solvi la problemojn de malsaĝaj samlandanoj,” la konsula funkciulo seke respondis al la klarigoj de Rikardo. “Nia

lando ne estas tiel riĉa, ke ĝi disdonu monon al ĉiuj petantoj. Se ni tion konsentus, la informo baldaŭ disvastiĝus, kaj la sekvo estus, ke oftigiĝus malzorgemo. “Kial atenti pri niaj aferoj,” la vojaĝantoj pensus, “se ni ion perdos, la konsulejo repagos al ni”. Ne, ne. Tio ne estus allasebla.”

Rikardo sentis sin pli kaj pli senespera. Kia senelireja situacio! Li naskiĝis en sufiĉe riĉa familio, sed tio nun neniom helpas. Eĉ se li povus telefoni hejmen... Tion li povus, fakte, eĉ sen mono, dank'al tiu aranĝo, ke la alvokito pagas... Sed tio ne utilus: liaj gepatroj nun vojaĝas ie en la mondo, kaj li tute ne sciis, kiel malkovri ilian nunan troviĝejon.

Li komencis malsati. En normalaj kondiĉoj, li facile povus malhavi manĝon multhore. Juna sana korpo povas elporti multajn mankojn. Sed la simpla penso, ke li povas havigi al si nek manĝon nek liton, igis lian deziron manĝi speciale viva kaj dolora.

Ne povante elteni plu, li decidis peti helpon de la preterpasantoj. Li prezentadis al ili malfermitan manon kaj kvazaŭ plorpete provadis tuŝi ilian koron, klarigante per malmultaj vortoj sian bedaŭrindan situacion. Sed neniu prenis lin serioze. Eble li aperis tro sana, tro bonfarta. Aŭ li ne sciis, kiamaniere uzi

sian voĉon por vekti la kompaton, kiu tradukiĝus per dono. Kia ajn la kialo, li ne sukcesis.

“La sola solvo estas ŝteli”, li ekpensis. Estis somero. La vetero plej belis. Paŝante sen preciza celo, li alvenis al vasta vendejo ekstera, kie kamparanoj unu apud la alia proponis dezirvecajn manĝaĵojn al malrapide irantaj promenantoj. Ŝtelo de unu frukto tie, de alia tie ĉi, montriĝis pli facila ol li komence imagis.

Rikardo estis ĝenerale plej honesta, kaj normale, ĉe tia neakceptinda faraĉo, voĉo leviĝus el la korfundo por aŭtoritate esprimi sian malkontenton al li. Sed ĉi-foje ĝi silentis. La malsincereco de Janĉjo, la malvarmeco de la policano, la konsuleja nehelpemo kaj la ŝtonaj koroj de l'surstrataj petitoj kvazaŭ pravigis ŝtelon.

Tiuj unuaj sukcesoj kuraĝigis lin plu iri samvoje: se li kaptos sufiĉe da mono, li povos reveturi al la malproksima, ege dezirata hejmlando. La stacidoma monŝanĝejo por tio montriĝos perfekta. Tien multaj gejunuloj el ĉiuj landoj alvenas lacege, iom dormante, kaj ne atentis siajn havaĵojn.

Pensite, farite. Post nelonge, Rikardo staris en la homplena stacidomo, apud la monŝanĝejo, kie longa aro da junaj homoj bonorde atendis unu malantaŭ la alia.

Rikardo atente observis. Kiam prezentiĝis bonega okazo — knabino metis sian videble plenan monujon en plej taŭgan lokon, kaj ĉesis atenti ĝin por turni la vizaĝon al siaj kunuloj brue ridantaj — li etendis la brakon por ĝin kapti kaj... ..kaptis lin ĉe la ŝultro peza, forta mano, aŭtoritata.

(daŭrigota)

Vortareto		oftiĝi	sıklaşmak	kamparano	koylü
		malzorgemo	dikkatsizlik,	dezirveka	istek uyandıran
konsulejo	konsolosluk		aldırmazlık	faraĉo	adi/kötü davranış
trafi	vurulma, hedeflenmek	allaseblaizin	verilebilir	malsinsereco	samimiyetsiz, kötü
bato	vuruş, tokat	senespera	umutsuz		niyet
malsaĝaj	akılsız	senelireja	çıkişsız	pravigi	doğrulayan (bir şeyi)
samlandano	vatandaş	alvokito	çağrılan	monŝanĝejo	döviz bürosu
disdoni	dağıtmak	troviĝejo	bulunulan yer	lacege	çok yorgun şekilde
petanto	talep eden	plorpete	ağlayarak dilenmek	brue	gürültülü şekilde
konsenti	kabul etmek	preterpasanto	yoldan geçen	aŭtoritata	otorite
disvastiĝi	yaygınlaşmak	kompato	acıma		

Pri la reguloj pri uzado de la interpunkcioj

La reguloj pri la uzado de la interpunkcioj estas en nia lingvo pli-malpli tiaj samaj, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj; sekve ĉiu povas uzadi en Esperanto la interpunkciojn tiel, kiel li uzas ilin en sia nacia lingvo. Estas vere, ke en diversaj detaloj la uzado de la interpunkcioj estas malegala en diversaj lingvoj; sed ĉar la objekto ne estas tre grava, tial ni pensas, ke ne venis ankoraŭ la tempo por difini en nia lingvo severajn regulojn por tiuj ĉi detaloj. En tiuj ĉi dubaj detaloj ĉiu povas uzi en Esperanto la interpunkciojn tiel, kiel li uzas ilin en sia nacia lingvo, kaj nur la uzo iom post iom ellaboros por tiuj ĉi negravaj detaloj difinitajn regulojn.

Esperantisto, 1893, p. 127

Pri divido de vortoj

Transportante la vortojn el unu linio en la sekvantan, ni ordinare dividas ilin per iliaj partoj gramatikaj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple dividas: «Esper-anto», «ricev-ita» k.t.p. Sed tio ĉi tute ne estas deviga regulo; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj: efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero pure papera, havanta nenion komunan kun la le-voj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividus ekzemple «apartenis», ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.

Esperantisto, 1893, p. 32

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio la fondinto de (8)

EL UNUA PARTO - TAŬO

15



Tiuj, kiuj en praaj tempoj estis kapablaj majstroj, estis en kaŝinteco ligitaj kun la nevideblaj fortoj. Tiom profundaj ili estis, ke oni ne povas koni ilin. Ĉar oni ne povas koni ilin, tial oni povas priskribi ilian aspekton nur pene. Ili estis hezitemaj kiel iu, kiu travadas en vintro riveron, memgardemaj kiel iu, kiu timas je ĉiu flanko najbarojn, diskretaj kiel gastoj, disiĝanta kiel glacio degelanta, simplaj kiel neprilaborita materio; vaste malplenaj ili estis kiel la valo, netraveblaj ili estis kiel la malklaro. Kiu (kiel ili) kapablas klarigi la malklaron kviete? Kiu kapablas krei (kiel ili) je daŭro la kvieton? Tiu, kiu konservas la TAŬO-n, ne avidas la plenan. Nur tial, ĉar li ne avidas la plenan, li povas esti sengrava, eviti la novan kaj atingi la perfektecon.

Rimarkoj de Anniespera

En la originala teksto la "Bi Er Xin Cheng" eble estis miskomprenita de Rikardo Vilhelmo. "Xin Cheng" signifas novigon. Jen la traduko de s-ro Wang Chongfang: Li povas konstante renovigi la malnovon.

Rimarko de Cezar

La strebado vivi en kaŝinteco estas la preciza malo de la nuna kutima avido je honoroj kaj gloro. Min tia hezitema "anonima" vivstilo ĉiam denove memoras pri mia avino, kiu nur milde ridetis, kiam mi kiel infano provis fanfaroni al ŝi pri miaj "grandaj kaj gloraj agoj". Rikardo Vilhelmo rimarkas, ke vivi kaŝite apartenas al la esenco de mistikulo. Ĉe la verkisto B.Traven tio fariĝis preskaŭ manio. Kelkaj tekstpartoj de B.Traven evidentiĝas, ke li bone studis Laocion. (cez)

(daŭrigota)



Mallonga Historio de Filozofio (14)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Baruĥ Spinozo.

Vasil Kadifeli

pensi kaj labori. Tiel li sentis sin pli sekura kaj pro tio lia libro *“Ethica”* estis publikigita post lia morto. Li eĉ rifuzis la proponon de Hajdelbergo Universitato fariĝi instruisto. Li nur diskutis siajn pensojn kun malmultaj homoj kaj unu el ili estis la filozofo kaj matematikisto Gottfried Leibniz (espeerante Lejbnico).

Skulptisto de lensoj: Baruĥ Spinozo



Ĝis tiam oni pensis ke Dio estis ie ekster tiu mondo, eble en paradizo. Sed Baruĥ Spinozo (1632-77) estis nekutima homo ĉar li pensis ke Dio estis en ĉi tiu mondo. Pro tio li verkis librojn pri “Dio kaj naturo”. Por li Dio estis naturo, kaj naturo estis Dio. Sed tio estis *“panteismo”* [PIV:

Sistemo, kiu identigas Dion kun la universo, instruante, ke ĉio en la materia kaj morala mondo estas nur manifestiĝo de ununura substanco], ia radikala pensado, pro kio li konfrontis problemojn.

Li naskiĝis en Amsterdamo, en juda familio el Portugalio. Amsterdamo estis loko kiel homoj rifuĝis pro krueleco, sed ankaŭ en Amsterdamo ekzistis limoj. Pro liaj pensoj li estis eĉ forpelita de sinagogo kiam li estis 24 jaraĝa. Do, li iris loĝi en Den Hago kaj pro tio oni konas lin kiel la *“Benedikto de Spinozo”*.

Multaj filozofoj estis impresitaj de geografio. Ĝenerale la paŝoj oni sekvas atenteme el la komenco ĝis la fino dum solvo de geometria problemo, kaj kies rezulto estas kutime miriga, impresas la homon. Se la aserto estas ĝustaj la rezulto devas esti ĝusta. Spinoza en sia libro *“Ethica”* verkis pri filozofio kaj analizis siajn pensojn ĝuste tiel, kiel oni faras en geometrio. En lia libro ne ekzistas trianguloj, cirkloj, periferioj ktp sed ekzistas konceptoj kiel Dio, naturo, libereco, sentoj ktp. Li metas la asertojn, difinojn, kaj pruvojn kaj analizas pere de geometria maniero sian teorion. Certe ne estas eksperimentoj kaj observoj sed filozofia alproksimiĝo kiu trafas la cerbon kaj kiun oni nomas *“racionalismo”* [PIV: *Doktrino, kontraŭa al empiriismo, kaj laŭ kiu ekzistas veroj kaj principoj, kiuj ne devenas de empirio, sed estas liverataj de nerefuteblaj aprioraĵoj].*

Spinozo ŝatis solecon ĉar tio donis lin tempon por

Li eĉ ne havis domon, sed loĝis en pensionoj. Li ne bezonis multan monon. Li skulptis kaj vendis lensojn por teleskopoj kaj mikroskopoj kaj kelkfoje homoj kiuj ŝatis liajn pensojn apogis lin per malgrandaj sumoj da mono. Sed eble pro tia vivmaniero li kaptis spiran malsanon kaj mortis je la aĝo de 44.

Se Dio estas senfina kaj senlima, tiam ne povas esti io kio ne estas Dio, alie Dio ne povas esti senfina. Do, ni ĉiuj estas parto de Dio... homoj, birdoj, plantoj, ŝtonoj.. ĉiuj. Tradiciaj religiuloj kredas ke Dio amas homon, kaj Dio respondas al la preĝoj de homo. Pro tio Dio kvazaŭ estas granda homo, kun ridetanta vizaĝo, kun barbo, kaj bona koro. Tio estas nomata *“antropomorfismo”* [PIV: *Atribuo al Dio aŭ al dioj de la formo, sentoj aŭ pasioj de homoj].* Spinozo pensis ke Dio ne havis formon, vi povas ami aŭ ne ami Dion, sed vi ne povas atendi ke Dio amos vin, ĉar Dio estas indiferenta al vi. Vi povas esti amanto de naturo sed ĉu vi povas atendi, ke naturo amos vin? Pro tio homoj pensis, ke Spinozo kredis je ia formo de *“panteismo”* kaj li estis ateisto kaj homo kontraŭ religio.

Li estis *“deterministo”* [PIV: *Doktrino, laŭ kiu ĉio en la universo, eĉ la homaj volo, estas la nepre necesa rezulto de antaŭaj kondiĉoj].* Por li ĉiuj agoj estis la rezulto de antaŭaj agoj kaj kialoj. Homoj pensas, ke ili libervole elektas siajn agojn kaj kontrolas siajn vivion, sed laŭ Spinozo, libera volo estis iluzio. Ĉio, kion ni faras estas reagi kontraŭ la okazaĵoj. Se ni kolerigas al iu/io tio estas pasiva ekzistado, vi nur reagis, sed vi ne havas la kontrolon enmane. Tamen li ankaŭ kredis, ke homoj celas ian homan liberecon kaj ne deziras sklavecon. Spinozo kredis ke anstataŭ lasi niajn sentojn aperi libere, pli bone estus, ke ili aperu pro niaj elektoj. Pro tio ni devas kompreni niajn agojn. Certe, ke niaj sentoj aŭ agoj ne estos tute liberaj sed tiam almenaŭ tio estus aktiva ekzistado.

Li estis klasika filozofo, kiu provis impresi la homojn per siaj pensoj, eĉ se ili forte kontraŭis ilin. Li ne sukcesis konvinki homojn, ke Dio estas naturo, sed kiam Georgo Elioto dum la Viktorina periodo tradukis la libron *“Ethica”* al la angla, li verkis, ke tamen li ne

povas akcepti la ekzistadon de Dio, li kredas je tio, kion Spinoza priskribis. Poste en la 20-a jarcento famuloj kiel Alberto Ejnŝtejno estis liaj mirantoj.

En resumo, laŭ Spinozo, Dio estas nepersona estaĵo,

kaj ne posedas homajn trajtojn, kaj pro tio Dio ne punos iun ajn pro ties pekoj. Dio estas en ĉio, kion ni vidas en ĉi tiu mondo, ankaŭ ni, homoj estas parto de Dio.

(daŭrigota)

Kriol: la kreolo parolata en Gvineo Bisaŭo



Kreoloj kaj piĝinoj estas interlingvoj, kiuj ekestas nature, kiam oni havas situacion en kiu la komunikado estas bezonata sed ne estas komuna lingvo inter la komunikantoj. Ni vidu la ekzemplon de Kriol, la kreolo parolata en Gvineo-Bisaŭo.

Laŭ la retejo "Ethnologue" (datumoj de la jaro 2006), estas 1 521 000 loĝantoj en la lando. Oficiale, la ŝtata lingvo tie estas la portugala (167 000 parolantoj), sed ĝin parolas malmulte da homoj kompare kun la Kriol (206 000 parolantoj kiel unua lingvo, kaj 600 000 kiel dua lingvo), kiu vere estas la lingvo nacia kaj de ĉiutaga komunikado tie. Krom tiuj du lingvoj, estas ankoraŭ aliaj 20 etnaj lingvoj parolataj tra la lando: Badyara, Bainouk-Gunyuño, Balanta-Kentohe, Bassari, Bayot, Biafada, Bidyogo, Jahanka, Jola-Felupe, Jola-Fonyi, Kasanga, Kobiana, Mandinka, Mandjak, Mankanya, Mansoanka, Nalu, Papel, Pulaar, Soninke. Do, entute 22 lingvoj en tiu ege malgranda lando. La kreola lingvo tie havas ege gravan rolon kiel interlingvo inter tiom multe da malsamaj lingvoj.

La landlimoj de Gvineo-Bisaŭo estas kun Senegalio (franclingva lando) kaj Gvineo (ankaŭ franclingva). Koloniigis ĝin Portugalio, ekde la fino de la XV-a jarcento, kaj pli intense ekde la XIX-a jarcento (Kihm 1984). Tamen, je la fino de la XVII-a jarcento, ne nur la portugaloj estis tie, kiel koloniantoj, sed ankaŭ angloj, nederlandanoj kaj francoj, pro la komerco de sklavoj. En 1897, ĝi fariĝis oficiala kolonio de Portugalio (laŭ akordo inter portugaloj kaj francoj, rilate al tiu fifama novkoloniismo, kiu okazis tra la tuta Afriko, fine de la XIX-a jarcento).

Dum la kolonia periodo, Portugalio ne tiom atentis pri la socia strukturo de la lando, kaj la klerigado, ekzemple, ne estis atentita de ili. Post 1915,

Portugalio pli intense uzis Gvineon-Bisaŭon por agrokultura produktado, kaj perfortis la enlandanojn por la deviga korplaboro. La diktatoro Salazar ekestris Portugalion en 1926, kaj tiam la perfortoj kontraŭ la koloniitaj landoj estis ankoraŭ pli intensaj. Ekde 1936, la loka popolo kontraŭis tiun koloniadon, kaj en 1956 estis kreita oficiala politika organizaĵo por la liberiĝo disde la kolonianto de Gvineo-Bisaŭo kaj Kaboverdo (portugale Cabo Verde).

Kiel oni povas konstati, la portugala lingvo kredeble ne estis ligita al bonaj aferoj kaj okazaĵoj de la gvineanoj, kaj eble tio influis la nuntempan situacion tie, pri kio estos pli da informoj en la daŭro de ci tiu teksto.

Inter 1961 kaj 1973, estis interna milito tie, celante la statuson de lando liberigita de la koloniinto. Ĝi estis la unua afrika kolonio, kiu liberigis sin de la koloniado de Portugalio. En 1974 Portugalio rekonis, ke ĝi estas liberigita lando, kaj tiu estis la unua fojo, kiam tio okazis rilate al afrika kolonio de Portugalio.

Tamen, kiel memsufiĉa lando post 1973/1974 la sociafinanca situacio daŭre estis ege malbona. Estis multe da gvineanoj, kiuj elmigris al Portugalio dum la 80-aj kaj 90-aj jaroj. Koruptado kaj aliaj problemoj ĉiam ĉeestis la historion de la lando, kiu ĝis nun estas unu el la plej malriĉaj en la mondo.

Dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj, Kriol populariĝis ne nur en Bisaŭo, la ĉefurbo de la lando, sed ankaŭ en aliaj urboj.

La silaba strukturo de la lingvoj estas ĉefe KV (konsonanto vokalo). Estas kvin vokaloj, kaj ili ĉiuj povas suferi influon de apuda nazala konsonanto. La frazo devas havi aganton kaj predikaton, en tiu ordo (do, estas SVO-lingvo – subjekto-verbo-objekto). Jen ekzemplo:

"Jon ta pista si amigus dinyeru senpri ku disgostu."

"Johano ĉiam prunteprenas monon de siaj amikoj dolore."

Karina OLIVEIRA

"La Lampiro n-ro 142" easp. org. br

Fonto: La Hodiaŭa Ĵurnalo (5/2/2017)

<https://drive.google.com/file/d/0B8ZPbkDUvBJSQWswaUxEV2xIUE0/view>

Alvoko al Amo

Poemo de Marjorie Boulton

Ho, Amo, vivkomenco, vivosumo!
Lumu por ni, per viaj gloroj mitaj,
sed, kiel ĉiuj mitoj, veraj! Fumo

perversan; kiuj kuras antaŭ bojoj
de nigraj hundoj; en profundaj histoj
portas la malebligon de l' amĝoj;

Ho, amo, ŝirmu en sekreta gardo
la senesperajn; ili vin perceptu,
almenaŭ malproksime, per rigardo.

kaj nuboj kaŝas vin de ni, perditaj;
sed brilu en la koroj, nin konsolu!
Trapiku la nubaron per zenitaj

brulu por la putinoj, la sadistoj,
fraŭlinoj kun infanoj, kaj sterilaj
edzinoj; viktimoj de l' faŝistoj

Ke ili renaskiĝu kaj adeptu;
aŭ, se la eblo ne ekzistas plu,
la faton ili konu kaj akceptu:

radioj, vivmistero! kaj parolu
al ĉiuj kiuj solas, sen esperoj;
diru al ili firme, "Ne plu solu".

kaj la viktimoj de si mem, kun brilaj
radioj benu ilin; benu ĉion
kio suferas; brilu por ekzilaj

ĉar mi, neniam nun en ama Du
estonte la Duono, mi, ruino,
estas pli eta ol ĉiela blu' –

Venu al la perditaj de la tero,
kaj montru la ĉielon sen makulo,
per lumo el pli pura atmosfero!

pecetoj de l' homaro; portu scion
al ili, per la supernuba helo;
lumigu nian homan tragedion!

kaj mia propra tristo kaj destino
nenion pruvas, kiel en la fiŝa
mondo pereas frajo laŭ rutino –

Venu al sinturmenta, pala ulo,
eŭnuko de la cirkonstancoj; venu
al nervmalsanulino sur insulo

Preter perfido, naŭzo kaj kruelo,
vi ja ekzistas ĉiam; ĉar mi vidis.
Mi, dum momento... super nub-
nivele...

Naturo estas malŝparema, riĉa;
la lumo ĉiam brilos super ĉio
eĉ se mi mem restados malfeliĉa...

dezerta inter homoj; kaj serenu
por iu toleranta edzan ligan
netolereblan! Vidu, brilu, benu!

Ruinigitaj homoj koincidis
nur per kompato, eble per hazardo...
tamen, li amis; lia am' validis.

inter la nuboj, jen la lumostrio,
ĉiama lumo, ora kaj espera –
ho, Amo, nia vera iluzio,

Alportu vivocelon, liberigon,
al ĉiuj kiuj sur malĝustaj vojoj
penadas venki strangan korp-instigon

kiu kondukas nin al vero vera!

Tago de Sankta Valentino



La 14-a de februaro estis la Sankt-Valentena tago. Dum tiu tago amantoj esprimas amon por siaj amatoj. Tradicie, oni donas malgrandajn kortuŝajn donacojn, kiel amokartoj, ĉokoladoj, kaj floroj. Nuntempe, ĝi ankaŭ estas tago por esprimi amikecan amon al bonamikoj aŭ geparencoj.

Ĝi devenas de la katolika festotago, laŭdire honoranta Sanktan Valentenon. Aliaj fontoj ligas la tagon al Valentinino, frua kristanisma skribinto de la 1-a jarcento. Ĝi estis tradicia popola festo angla, sed disvastiĝis tramonde, eĉ en Barato, kie ĝi estas furora.

“Utaaro de Takuboku”

Japana poem-stilo

En la januara Sumoo mi prizorgis la supran 25 legantoj, kaj en ĉi tiu grup estis japano, kara Monsano (Masahiro MOĈIZUKI) kiu legis la "Utaaron de Takuboku" de la japana poeto Iŝikaŭa Takuboku.

Poste tiu parto sendependiĝis kaj fariĝis aparta parto de poemetoj, kiuj konsistas el kvin versoj de 5-7-5-7-7 silaboj respektive. Sed Takuboku ŝanĝis tiun kvin-versan stilon al tri-versan poemeton. La stilo de Takuboku estas speciala, do ankaŭ la nunaj uta-poetoj verkas ilin en tiu stilo.

Mi du longa tempo sciis kio estis "hajko". Tiuj poemetoj kun tri versoj kaj kun 5, 7, 5 silaboj respektive. Sed la "utaon" mi por la unua fojo aŭdis. Do mi petis al li, ke li ekspliku al mi kio estas "utao".

Hajko naskiĝis el la historio de utao, antaŭ pli ol 300 jaroj, kaj ĝi estas mallongigita poemeto de tri versoj kun 5-7-5 silaboj respektive.

"Utao" estas la stilo de poemoj kiun oni ankaŭ nomas "tanka"on. Fakte tiu estis la fina mallonga parto de longaj tradiciaj japanaj poemoj antaŭ pli ol 1200 jaroj.

Laŭ la japana lingvo oni kalkulas la vokalojn aŭ sonojn, ĉar ordinare japanaj vortoj konsistas el vokaro

kun konsonantoj sed kompreneble tiuj ne estas ordinaraj konsonantoj. En aliaj lingvoj kiuj uzas silabojn la stilo iomete ŝanĝiĝis ĉar en la japana estas sonoj (on).

Jen ekzempler de utao en Esperanto:

La propran nomon (5) mi mem vokante vee (7)
nur sola larmis,(5)
Sed la dekkvar jaraĝa (7) primtemp' ne venos ree. (7)

La sama utao en la japana lingvo sonas kiel jene:

Onoga nao (5) honokani yobite (7)

Namidasesi (5)
Ĵuusi no haruni (7) kaeru subenasi (7)
Jen alia bela utao en Eperanto lingvo:

Ho, Shibutami (5), vilaĝo ĉiam kara (7)
en mia koro! (5)
Montet' kun rememoro ! (7)
River'kun rememoro ! (7)

I ika a Takuboku



Veganarto

Kartvela kuirarto: melongeno kun herboj kaj tomatoj



En tiuj ĉi lastaj tagoj mi komencis

iom esplori la kartvelan kuirarton kiu estas tre riĉa, bunta, bongusta kaj varia sed ne tro konata kaj en Hispanio kaj en 'Okcidento'. Mi konatiĝis kun la kartvela kuirarto en la najbara lando Armenio kie mi loĝis ses monatojn. Tie famas pluraj restoracioj kie eblas manĝi tradiciajn kartvelajn manĝaĵojn. Kartvelio estas fascina kaŭkaza lando, kies geografio plenaj de montaroj, kun pluraj valoj kaj la Nigra Maro certe donis al ĝi unikan karakteron. Multaj el ĝiaj pladoj estas adaptoj aŭ versioj de pladoj komunaj al aliaj najbaraj popoloj sed sendube ĝia kuirarto multege influis ankaŭ la najbarojn. El inter ĝiaj plej famaj manĝaĵoj troveblas ĥaĉapuroj, ĥinkaloj kaj pluraj melongenaĵoj kaj fazeolaĵoj kiuj havas diversajn versiojn laŭ la regionoj.

Melongenoj tre oftas en ĝiaj pladoj kaj ekzistas multaj receptoj kies ĉefa ingredienco ĝi estas! En la sekva recepto ĝi ludos ankaŭ gravan rolon!

Ingrediencoj:

- 1 melongeno
- 3 tomatoj
- 3 cepoj
- 10 gr da freŝa bazilio
- 10 gr da freŝa koriandro
- 1 verda kapsiko
- Nigra papriko
- Ruĝa papriko
- 2 ajleroj
- Salo
- Oleo



Paŝoj:

- 1- Tranĉu lamene la melongenon kaj fritu ĝin ambaŭflanke.
- 2- Senŝeligu kaj tranĉu etkvadrate la cepojn.
- 3- En kaserolo: aldonu olivoleon kaj fritu la cepon, movu ĝin ofte dum 5 minutoj kaj poste aldonu la tranĉitajn kaj senŝeligitajn tomatojn kaj lasu ilin tie sur malalta fajro dum kelkaj minutoj.
- 4- Sekve, aldonu la ajlerojn, la spicojn kaj salon laŭplaĉe. Movu ĝin kaj aldonu la herbojn (tranĉu ilin). Laŝu ĝin kelkajn minutojn pli.
- 5- Fine aldonu al ĝi la frititajn melongenojn! Mi mem fritis kaj aldonis kelkajn al la kaĉo mem kaj poste fritis pliajn kaj ornamis la pladon!

- Bonan apetiton! გემრიელად მიირთვიეთ!

Fonto: <http://veganarto.net/kartvela-kuirarto-melongeno-kun-herboj-kaj-tomatoj/>

(EO-turka vortareto estas en la posta paĝo)

Vortareto		kaŭkaza	Kafkaslara dair	ajlero	diŝ sarmisak
		plado	tabak (servis)	lamene	tabaka, dilim ŝeklinde
kartvela	Gürcistana dair	ĥaĉapuro	Gürcü böreği/pidesi	etkvadrate	küçük küp ŝeklinde
melongeno	patlıcan	ĥinkalo	Gürcü mantısı	senŝeligu	kabuklarını soy
bunta	renkli	bazilio	fesleğen	kaĉo	helme, lapa, sos,
fascina	etkileyici	koriandro	kiŝniŝ		yemeğın kendisi

Ŝercoj



Viro en vendejo la 1-an de januaro:

– Ĉu la pano estas freŝa?

– Ĝi estas pasintjara.

Edzo: Kio estas por tagmanĝi?

Edzino: nenio.

Edzo: Sed tio estis ankaŭ hieraŭ.

Edzino: Jes, mi kuiris por du tagoj.

Motoro de aviadilo paneis kaj la aviadilo komencas malaltiĝi. Fine la piloto konstatas: "Necesas malpezigi

la maŝinon; iu devas sin oferi!" Stariĝis kimro kaj ekkriis "Mi oferas min pro Kimrujo!", kaj li elsaltis. Tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis irlandano kaj ekkriis "Mi oferas min pro Irlando!", kaj li elsaltis. Kaj tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis tiam skoto, li ekkriis "Mi oferas min pro Skotlando!", kaj li ... elĵetis la ... anglon.

Juda malbeno:

"Mi deziras al vi, ke vi estu tiom riĉa, ke la dua edzo de via vidvino neniam devos serĉi laboron!"



Kruĉvort-enigmo



Horizontale

1. Havi la saman opinion, esti en akordo pri; Rilata al havi koran inklinon al iu;

2. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; Punkto de kiu io

evoluis kaj disvolviĝis;

3. Sceno, en kiu unu sola persono, estante aŭ kredante sin sola, parolas al si mem; Denove;


4. Ago de instanco, kiu per oficiala akto nuligas aŭ forigas aranĝon aŭ kutimon; Odora dipteriko;

5. Sufikso, esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj; lu nombr' da homoj kun komuna eco socia;

6. Trinkajo, preparita per infuzado de sekigitaj folioj de ĉinia kamelio; Organo de animalino, ĝenerale para, en kiu formiĝas la ovoloj, k kiu sekrecias hormonojn;

7. Malica demono, en la araba mitologio; Kalkulilo, konsistanta el bidoj trairitaj de stangetoj, laŭ kiuj ili estas ŝoveblaj;

8. Punkto, kie kruciĝas kurboj, vojoj; Skeleto de la kapo de la vertebruloj, entenanta kaj ŝirmanta la cerbon, kaj plejofte konsistanta el ostosubstanco;



9. Hebrea pastra vesto; Irvoj' en ĝardeno aŭ parko, inter du vicoj de arboj;
10. Planto de plurjaraj herboj kun elbazaj folioj en rozeto, la aliaj ofte kontraŭe duopaj, kaj kun grandaj radiaj kapituloj, kies akenoj unuope portas hartufon; Inverse, ĉefurbo de Japanio;

Vertikale

1. Meritanta, vekanta senton de kortuŝo pro ties malfeliĉo;
2. Lirika poemo, dividita en strofoj, ordinare similaj inter si; Parto de velo, kiun oni faldas por malgrandigi la surfacon allasitan al la vento;
3. Virina nomo kaj unu el la vel»sipoj de Kolumbo; Societ' el kavaliroj, pli poste el religiuloj, monaĥoj, kies membroj faras ĵurpromeson vivi laŭ difinitaj reguloj;
4. Homo, kiu konstante, senpripense kaj sendistinge admiras kaj imitas ĉion, kion li/ŝi opinias laŭmoda; La 21a grafemo de la greka alfabeto;
5. Dio de la ventoj; Inverse, sentegmenta spaco, ĉirkaŭita de konstruoj, el kiu la ĉambroj ricevas lumon kaj aeron;
6. La frukto de arbo, unue hele verda, poste nigra, oleoriĉa, havanta amaran karnon kaj tre malmolan kernon unuseman, manĝata salita kaj uzata por produktado de manĝoleo; Partikulo montranta logikan sekvon, konkludon el la antaŭa diritaĵo;
7. Ceremonia vira vesto de la antikvaj Romanoj, konsistanta el vasta lana tuko, kiun oni drapire volvis ĉirkaŭ la korpo, lasante libera la dekstran brakon; La dekkvina grafemo de la E-a alfabeto;
8. Unu movo en ia direkto; Malofta, maldensa;
9. Rilata al grupo de fratrioj aŭ kurioj, kunigitaj per religia ligilo, havanta propran protektantan dion k propran komunan sanktejon;
10. Kulturata kampo; Inverse, ciu el la fonetikaj simboloj de la japana skribsistemo;
11. Esprima aspekto de la vizaĝo kaj de la sinteno; Malsupra ĉeftrabego aŭ trabkunaĵo, kiu etendiĝas de la antaŭo ĝis la malantaŭo de la kareno, kaj sur kiu sin apogas la tuta ligna aŭ ŝtala strukturo de ŝipo;
12. Ago de iu, kiu enprenas fremdan teritorion en sian regnon; La sekigitaj folioj de ĉinia kamelio;

Unu Glaso Da Lakto

Facila rakonto

Malriĉa knabo, kiu vendis brikabrakojn de pordo al pordo en la kvartaloj la urbo kaj tiel pagis siajn studkostojn, iutage forte iĝis mizera kaj malsata. Li havis nur unu moneron en sia poŝo kaj pro malsato, estis tre premata. Li decidis frapi la pordon de iu domo por peti iom da manĝaĵo. Tamen, kiam bela fraŭlino malfermis la pordon, li hasteme anstataŭ manĝaĵo petis nur unu glason da akvo. La fraŭlino sentis, ke li estas tre malsata. Ŝi alportis al li unu grandan glason da lakto. La knabo prenis la glason kaj eltrinkis la tutan lakton. Li trinkinte la lakton, mallaŭte diris: mi elkore dankas vin, kiom mi pagu? "Nenion. Nia patrino instruis nin neniam akcepti monon pro afableco". La fraŭlino respondis. La knabo tre dankis kaj adiaŭis ŝin.

Post foriĝo de tiu domo, la knabo, kies nomo estis Howard Kelly, ne nur sentis sin pli forta korpe, sed ankaŭ lia kredo je Dio kaj ankaŭ bonvolemaj homoj pliiĝis. Ĝis antaŭ ol tiu ĉi okazo li intencis forlasi sian studon.

Kelkaj jaroj poste... juna virino forte malsaniĝis. La kuracistoj de ŝia urbo konfuziĝis. Oni sendis ŝin al pli granda urbo, kie oni vokos specialistoj por studi pri ŝia rara malsano. Oni vokis doktoron Harvard Kelly por

konsulti pri stato de tiu virino. Kiam li aŭdis la nomon de ŝia devena urbo, stranga lumo plenigis liajn okulojn. Li tuj stariĝis kaj iris al ŝian ĉambron. D-ro Kelly tuj rekonis ŝin. Li decidite revenis al sian ĉambron por fari sian plej bonan por savi ŝian vivon.

Post la longa batalo finfine li sukcesis venki tiun raran kaj fortan malsanon.

Alvenis tago, en kiu la malsanulino devas forlasi la hospitalon. La virino time kaj maltrankvile malfermis la kalkulon. Ŝi rigardis la ĝin. Ŝiaj okuloj trafis iun frazon: "tuta elspezo pli antaŭe estas pagita per unu glaso da lakto. Subskribo: D-ro Howard Kelly."

La virino ŝokiĝis. Memoris tiun tagon. Knabo por unu glaso da akvo frapis la pordon kaj ŝi venigis al li unu glason da lakto. Larmoj fluis sur ŝiaj vangoj. Ŝi nur povis diri: danke al Dio... danke al Dio, ke via amo ankoraŭ fluas je koroj kaj manoj de la homoj...



Estrara Komunikado: EKO 2016-40 sendita el Bunda, Tanzanio, la 31an de decembro.

La 6a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA ĵus venis al fino; la okdeko da partoprenintoj iom post iom hejmenvojaĝas al lokoj en 14 landoj, multaj ekster la kontinento (Brazilo, Francio, Hungario, Koreio, Islando, Japanio). Afrikanoj venis el ok landoj (pluraj kun financa subteno de UEA aŭ TEJO), la granda plimulto kompreneble el Tanzanio, kun forta reprezentado de lokuloj el la urbo Bunda mem, aŭ la iom proksima grandurbo Mwanza. Entute estis 102 aliĝoj; kelkaj estis subtenaj aliĝoj, aliaj spertis vojaĝ-malfacilaĵojn kaj devis retiriĝi.



La malferma ceremonio okazis en merkredo, la 28an de decembro, ŝovita unu tagon pro la malfriĝo en la alveno de la 11-persona korea karavano. La solenaĵo daŭris preskaŭ kvar horojn, kun multaj salutoj, vivaj (Afrika Komisiono, prezidanto de LKK, la vicprezidanto de UEA kaj aliaj) kaj laŭtlegetaj (de la Prezidanto de UEA, de ILEI, de IKEF kaj la korea grupo kaj JEI.) Aldoniĝis landaj salutoj.



La honora gasto la malfermo estis sino Lydia Simeon Bupilipili, la Distrikta Komisiito por la distrikto Bunda. Ŝi estis en la lastaj monatoj

nomumita de la ŝtata prezidento, d-ro John Pombe Magukuli. Ŝi parolis elokvente en la svahila kun traduko, kaj kun kelkaj frazoj en Esperanto. Temis grandparte pri evoluigaj projektoj en la distrikto – pli bona akvo-mastrumo, lernejoj, infrastrukturo. Ŝi varme

bonvenigos la engaĝiĝon de esperantistoj en tiuj taskoj – influita per vizito en la antaŭa tago al la Esperanto-lernejo en la vilaĝo Marambeka (40 km de Bunda), pri kio ni esperas raporti en estonta EKO.

Diskonigo de la kongreso okazis tre efike per grandioza futbalmatĉo, kiu altiris almenaŭ 500 lokulojn. Nesurprize, ĉar la esperanta teamo, en belegaj verd-blankaj uniformoj, ludis kontraŭ la loka teamo, 'Bunda Veteranoj'. Konigo de la lingvo klare okazis; dum (sola) alpromeno, pluraj urbanoj kriis "Esperanto!" kaj eĉ "Saluton!". La verda teamo ludis solide en la unua duono kaj arigis du golojn kontraŭ nulo, kio rikoltis entuziasmajn kriadojn kaj banderolumadon de la esperantistoj. Sed tra la dua



duono, ni rimarkis la nesfiĉan eblon por la E-teamo ekzercadi kaj provludi kune; ili eklaciĝis kaj ne sukcesis reteni la pilko-posedon. La fina rezulto (4-2 favore al la bundanoj) ĝojigis la spektantaron – ĉio finiĝis en bona etoso. La publiko kontinue aŭdis la vorton 'Esperanto', ĉar la matĉo ricevis laŭparolilan komentariadon – alterne aŭ samtempe en la svahila kaj Esperanto.

Okazis multaj programeroj, ne eblas menciigi ĉiujn. Tra la lastaj tagoj okazis ekzamenoj de UEA/ILEI. 25 bravuloj prezentis sin por la antaŭtesto, el kiuj 20 rajtis pluiri. En la unua nivelo, ok el la dek du provantoj sukcesis; en la dua nivelo, ĉiuj ok provantoj atingis sukceson, kun iom similaj kaj altaj poentaroj. Entute bonis la lingva nivelo. Memorinda kongreso, klare la plej granda kaj plej varia el la ses ĝisnunaj afrikaj kongresoj de UEA.

>> Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe:

<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>

Hajkoj de Hirotaka Masaaki (Vastalto)



flokaj de neĝo
kroĉiĝas sub sunlumo --
nigra asfalto

lumo kaj ombro
klare straton dividas --
neĝa mateno

branĉoj fleksitaj
sub freŝa dika neĝo --
matena lumo

Ofte artistoj estas malriĉaj. Tia estis Andersen, la fama dana poeto. Do li iris al la kortumo de la reĝo, en Kopenhago.



Tie okazis kokteloj en la parkoj kaj la kompatinda poeto povis manĝi iom el la diversaj pladoj tie prezentitaj. Lun tagon li konatiĝis tie kun sinjoro Houriet el Le Locle, Svislando. (Le Locle estas 7km for de La

Chaux-de-Fonds kaj 7km for de mia vilaĝo Les Brenets). Tiu sinjoro Houriet estis horloĝfaristo kaj restadis en la kortumo de la dana reĝo por ripari ĉiujn horloĝojn. Houriet kaj Andersen amikiĝis. Houriet invitis Andersen al Le Locle. Tien venis Andersen trifoje. Nun en Le Locle estas memortabulo ĉe la muro de la domo Houriet kaj strato havas la nomon Andersen.

Kiam mi restadis en Japanio en 2012, mi malkovris Andersen-parkon en la urbo Funabashi apud Tokio. Mi vizitis ĝin. Temas pri grandega belega parko kun kulturcentro, kie homgrupoj, ĉu klasoj, ĉu aliaj, povas ekzerci potfaradon, teksadon, desegnadon,

paperfaldadon, kuirarton ktp. Mirinda loko! Sed mi demandis al mi: Kial la loĝantoj de Funabashi elektis la nomon Andersen? Mi eksciis, ke la urbestro de Odense, dana urbo, kie Andersen naskiĝis, sekvis kurson pri informatiko en Funabashi kaj renkontis ties urbestron. Ili konatiĝis, amikĝis kaj decidis ĝemeligi siajn du urbojn: Odense en Danlando kaj Funabashi en Japanio. Danoj organizis tiun mirindan kulturcentron en la parko, kaj japanoj decidis doni la nomon Andersen al la parko.

Mi havas revon: mi deziras starigi
triangulan ĝemeliĝon de
Le Locle, Svislando
Odense, Danlando
Funabashi, Japanio
per la helpo de lokaj esperantistoj!!!



Fonto: Juna Amiko februaro 2014 – n-ro 3-2013 (138)

Esperanto estu la komuna lingvo de Olimpikoj



La Olimpikoj estas unu el la plej grandaj internaciaj eventoj. Dum tiu ĉi evento sportistoj kunvenas de diversaj nacioj kun diversaj lingvoj. Laŭ filozofio de la Olimpikoj, venki ne estas la ĉefa temo, sed partopreni kaj bone konkursi. Sporto estas ilo, kiu servas por paco, amikeco kaj ŝanĝo de la mondo.

Do, la celo de Olimpikoj estas kreo de pli paca kaj pli bona mondo same kiel la celo de Zamenhof. Sed ĉu nur havo de bonaj ideoj sufiĉas? Jen estas demando: ĉu la ideoj kaj pensoj per si mem efektivas/os? Dum la Olimpikoj, kiom da profunda amikeco estiĝas inter la sportistoj? Kiom ili proksimiĝas unu al la aliaj? Ili kolektiĝas, konkursas, sed io grava mankas. Dum la Olimpiaj ludoj sportistoj preterpasas unu la aliajn, kaj iliaj uzataj vortoj povas esti nur "saluton" aŭ "kiel vi fartas?" angle aŭ allingve, ĉar ili ne havas rimedon interparoli pri diversaj aferoj unu kun la alia.

Antaŭ la Olimpikoj en Rio-de-Janeiro 2016, la

perskanalo de BBC montris intervjuon kun iu japana virino. Ŝi diris, ke ŝia lando bezonos almenaŭ 75000 tradukistojn por la Olimpikoj en 2020.



Dank' al ŝia intervjuo, aperis en mia kapo unu demando: kial ni ne lanĉos kampanjon uzi kaj apliki

Esperanton en la Olimpikoj? Japanio estas pionira lando pri Esperanto. Mi petas, ke Japana Esperanto-Instituto proponu al IOC uzon de Esperanto en la Olimpikoj. Mi esperas, ke ankaŭ UEA, E-asocioj de ĉiuj landoj kaj pacemuloj tra la mondo subtenos ĉi-movon kaj la kampanjon.

Alia laboro, kiun niaj japanaj geamikoj povas fari, estos aldoni Esperanton al la list-lingvoj de la poŝtelefono. Kaj ankaŭ kreo de taŭgaj aplikaĵoj, je kiuj troviĝos diversaj informoj pri la Olimpikaj ludoj, bezonataj

informoj por turistoj kiel publikaj veturiloj, hoteloj, restoracioj kaj manĝaĵoj, vidindaj lokoj ktp.

Fonto: Esperanto en Azio (Bulteno de KAEM), N-ro 93, oktobro 2016

Fine menciindas, ke ideo de ĉi-kampanjo stariĝis en nia lasta kunsido kun profesoro Saheb-Zamani, patro de Esperanto en Irano kaj nia granda instruisto.

Amir FEKRI (Irano)

Esperanto Kursu (15)



Tekrar merhaba,

Bu ay da olaĝan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LECIÓN PRI "EJ"

Iun tagon Fraŭlino Saĝa, la instruistino, instruis al la infanoj la signifon de silabo 'ej' al-don-ita¹ al vorto.

"Johano! Kie estas la hundo?"

"Li sidas en la hund-ej-o, Fraŭlino," respondis Johano, kaj li al-diris; "Mi ankaŭ volas sidi en la hund-ej-o, kun la hundo. Ĉu vi permesas min iri?"

"Ne, Johano, certe ne!"... Ŝila! Ĉu vi povas doni al mi alian vorton por 'dormo-ĉambro'?"

"Jes, Fraŭlino. Mi povas: 'Dorm-ej-o'."

"Bone! Vi dormas en la dormo-ĉambro, aŭ en la dorm-ej-o."

"Mi preferas dormi en la hund-ej-o," diris Johano.

"Silentu, Johano! Roĝero kie estas via ĉevalo?"

"Li estas en la ĉeval-ej-o."

"Bone! Johano, kie vi ludas?"

"Mi ludas en la hund-ej-o, aŭ en la ludo-ĉambro; sed mi volas nun iri por ludi en la hund-ej-o."

"Sed vi ne povas iri! Roĝero, kie vi ludas tenis-on?"

"Sur la tenis-ej-o, Fraŭlino."

"Bone! Nu, atentu! 'Ej', al-don-ita al vorto, signifas 'la lokon, kie'..."

Tiam Fraŭlino Saĝa skribis sur la nigra tabulo:

Ni dormas en la dorm-ej-o.

Ni ludas en la lud-ej-o.

La hundo dormas en la hund-ej-o.

"Ĉu vi komprenas tion?"

"Jes" diris Johano. Tiam li kuris el la lern-ejo, dirante: "Mi ŝatas ludi en la lud-ej-o; mi ŝatas sidi en la hund-ej-o kun mia hundo; mi ŝatas ludi en la ĉeval-ejo kun la ĉevalo; sed mi ne ŝatas lerni en la lern-ej-o."

Ne, Johano ja ne estas bona museto!

Tiam la instruistino re-komencis la lecionon. Per peco da kreto, ŝi skribis sur la nigra tabulo, kun grandaj literoj² :

Ni lernas lecionojn en la lern-ej-o
Ni konservas grenon .. en la gren-ej-o
Bovinoj loĝas en la bovin-ej-o
Ni ludas kriketon sur la kriket-ej-o
Orfoj loĝas en la orf-ej-o

"Kio estas orfo?" demandis Ŝila.

"Orfo estas infano, kiu havas nek patron nek patrino," respondis la instruistino.

"Ho, la kompat-indaj infanoj!" diris Ŝila. "Mi ne volus esti orfo. Mi multe amas mian patron kaj patrino. Mi kompat-as la orfojn."

"Mi ankaŭ," diris Fraŭlino Saĝa. "Ĉiu orfo estas kompat-inda."

¹ Signo de al-dono: + Signo de multipliko: x

Signo de de-preno: - Signo de divido: ÷

² Notu: A, B, C estas literoj; sed ni skribas leterojn al niaj amikoj.

Sözlük

al-diri	dediklerine ilave etmek	kreto	tebeşir
al-doni	ilave etmek	kriket-ej-o	kriket sahası
al-don-ita	ilave edilmiş	kriketo	kriket
atentu!	dikkat et!	lern-ej-o	okul
bovin-ej-o	ağıl	litero	harf
ĉeval-ej-o	ahır	lud-ej-o	oyun odası = ludo-ĉambro
ĉevalo	at	nek ... nek ...	ne ... ne de (kalıp)
dorm-ej-o	Yatak odası, yatakhane = dormo-ĉambro	orf-ej-o	yetimhane
gren-ej-o	tahıl ambarı	orfo	yetim, öksüz
greno	tahıl	peco	parça
hund-ej-o	köpek külübesi	permesi	müsaade etmek
kompati	acımak (birine)	re-komenci	tekrar başlatmak
kompat-ind-a	acımaya değer, zavallı (kişi)	signifo	anlam
kompreni	anlamak	silabo	hece
konservi	saklamak	silentu!	sus! sessiz ol!
		tenis-ej-o	tenis kortu
		teniso	tenis

Ekler:

-ind- Kelimenin esas anlamına "değer" anlamını katıyor.
(ör. Konservî= saklamak, konservinda=saklamaya değer)

al- Kelimeye "ilave, bir yere" anlamını katıyor,
(ör. diri=demek, al-diri= ilave etmek) (ör: veni=gelmek, al-veni:varmak)



Ludwik Zamenhof 'un 100. ölüm yıldönümü

UNESCO işbirliğiyle anma etkinlikleri yapılacaktır



<http://en.unesco.org/celebrations/anniversaries/2017/all?page=1>

Kapaniŝ



Ĝuste ĉi tiu dergimuz Turka Stelo'nun mart sayısı.

Umuz ediyozur ki onu beęendiniz ve bűyűk kısmını okudunuz, unkű okumak ęrencinin dil seviyesini geliŝtirir.

Eęer daha fazla okumak ve aynı zamanda dűnyadaki dięer esperantistlerle birlikte okumak istiyorsanız bir Esperanto Sumoo aktivitesine katılabılırsınız. Bunun hakkından dergimizin 3. sayfasındaki Esperanto Sumoo sűtununu okuyabılırsınız.

Gelecek sayımızda sizleri belki ok daha fazla enteresan yazılar bekliyoer olacak.

Sonraki sayımızda buluŝmak űzere...

PRINTEMPOS

de la 14-a ĝis la 22-a de Aprilo 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

- * Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj
- * Aktivadoj kaj ekskursoj
- * Seminario AMO (16–20 de Aprilo)
- * Prelegoj kaj atelieroj
- * Trapasu esperanto-ekzamenojn (ILEI)

instruos, gvidos kaj prelegos :


Zofia
KORODY


Christophe
CHAZAREN


Marion
QUENUT


Nimille
CROSJEAN


Sam
SPANO


Stefan
MacGILL





*Solvo de la
kruĉvort-enigmo*

T	O	K	I	O		O	K	I	N	R	A	10
E	L	A			O	D	O	F	E		D	9
O	I	N	A	R	K		R		D	O	N	8
	K	A	B	A		O	T	I	R	I	F	7
O		O	R	I	A	V	O		O	E	T	6
S	O		R	A		I		O			A	5
K	N	O	T		O	L	O	B	A		P	4
E	E	R		O	G	O	L	O	N	O	M	3
N	I	G	I	R	O		O	N	O	D	O	2
A	M	A		T	I	N	S	E	N	O	K	1
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	

Jen la marta numero de nia revueto Turka Stelo.

Ni esperas ke vi ĝin ŝatis kaj legis la plej parton de ĝi, ĉar legado estas tio, kion plibonigas la lingvonivelon de la lernanto.

Se vi volas legi pli kaj samtempe kune kun esperantistoj en la tuta mondo vi povas alięi al Esperanto-Sumoo. Pri tio vi povas legi la Esperanto-Sumoo kolumnon en la tria paęo de nia revueto.

En la venonta numero vin atendas eble pl interesaj artikoloj kaj rakontoj.

Ĝis revido en la venonta numero.

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51
Sub aŭspicioj de UEA
en Konsulta Partnereco kun Unesko

Nazim Hikmet Ran



Poezia antologio

El la turka tradukis Vasil Kadifeli

Mondial

Aĉetu ĝin papere ĉe:

http:

[//katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9402](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9402)

aŭ ĉe:

[https://www.amazon.com/Poezia-](https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-Al-Esperanto/dp/1595693297/ref=sr_1)

[Antologio-Poemtraduko-Al-](https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-Al-Esperanto/dp/1595693297/ref=sr_1)

[Esperanto/dp/1 595693297/ref=sr_1](https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-Al-Esperanto/dp/1595693297/ref=sr_1)

[_8?ie=UTF8&qid=1479633135&sr=8-](https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-Al-Esperanto/dp/1595693297/ref=sr_1)

[8&keywords=nazim+hikmet](https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-Al-Esperanto/dp/1595693297/ref=sr_1)

Aĉetu ĝin elektronike ĉe:

http: [//www.librejo.com/](http://www.librejo.com/)